

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՆԱՅԼԻ
ՅԵՐՈՅԵՆԻՔՄԱՋԵՄԱՅ

Ĉi-numere legu pri:
LA 10-a KONGRESO DE EEU EN RIJEKA
NOVAJ SUKCESOJ EN BJELOVAR
"DE PATAGONIO ĜIS ALASKO"
VARAŽDIN - PERLO INTER
URBOJ DE LA MONDO
LA PLEJ MALNOVA EŬROPA KALENDARO
RENKONTIĜO KUN PADMA EN SUBOTICA
LA UNUA IRANA ESPERANTO-KONGRESO

Detalo de la fortikaĵo de Varaždín

1

2014

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

Pagebla al konto de Dokumenta Esperanto-Centro:

HR5023600001102158381

aŭ al UEA-konto:

deoc-f

RESUMO

Esperanto-movado en Kroatio komencas la jaron 2014 kun multaj novaĵoj. La plej granda internacia aranĝo en Kroatio estas preparata en Rijeka, kie en julio okazos la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, aŭspiciata de la prezidento de Kroatio, s-ro Ivo Josipović. Post dekkvar monatoj de intensa laboro, finiĝis la komuna tradukprojekto, dum kiu 25 tradukantoj Esperantigis la verkon de Tibor Sekelj "De Patagonio ĝis Alasko". Ke la nomo de Tibor ankoraŭ okupas atenton de ĉiuj, montras ankaŭ la aranĝo "Renkontiĝo kun Padma" en Subotica (Serbio). Intertempe Kroata Esperanto-Ligo ricevis la Premion "Cigno", kiun atribuas japana industriisto Etsuo Miyoshi. Pri tiu novaĵo ni skribas el kritika vidpunkto.

La redakcio de "Zagreba Esperantisto" invitas vin partopreni la Literaturan konkurson "Ivo Rotkvić", kaj ekde ĉi tiu numero ankaŭ niaj kunlaborantoj partoprenos la ĵurnalistan konkurson "Degenio velebita".

Bjelovara Esperantista Societo plue aktivas. Plej multe ĝojigas, ke per la financa subteno de sia societano, ĝi okazigas senpagan kurson, kaj ke la Departemento Bjelovar-Bilogora subtenis finance ĝiajn klopodojn por gastigi iun el la estontaj ILEI-konferencoj en Bjelovar. En 2016 la ILEI-konferencon organizos Oostende (Belgio), sed ni plue esperu por iu alia jaro. Ĉu Kroatio estos pli bonŝanca en Bonaero (Argentino), kie UEA decidis pri estontaj Universalaj Kongresoj? Jam antaŭe kandidatiĝis San-Francisko, Lisbono, Seulo kaj Zagrebo, kaj la plej nova konkuranto fariĝis Nitra (Slovakio). Laŭ bone informitaj rondoj la plej dezirindaj kandidatoj estas Portugalio kaj Slovakio, kie Universala Kongreso antaŭe ne okazis.

Pri Kroatio ni publikigas du interesajn artikolojn. La unua prezentas la urbon Varaždín, kiun la usona gazeto "New York Times" proklamis perlo inter urboj de la mondo. La alia konigas al la legantoj la plej malnovan eŭropan kalendaron, ekestintan en la Vuĉedola kulturo de Vinkovci antaŭ 8500 jaroj!

Ni prezentas al vi plurajn internaciajn aranĝojn, kiuj okazis en Slovakio, Irano, Kartvelio ktp.

KEL preparas sian elekton jarkunvenon. Post ĝia okazigo ni informos vin pri la rezultoj en iu sekva numero.

Dume nia redakcio klopodas atingi la nombron de 300 abonantoj. Komencaj rezultoj kuraĝigas, kaj ni optimisme proksimiĝas al tiu celo.

Bonan legadon de ĉi tiu numero!



KIAL NI NE FIDAS LA POŝTISTOJN?

✉ Redakcia kompilo

En daŭro de kelkaj monatoj, nia redakcio plurfoje ricevis leterojn, en kiuj, laŭ la informo de la sendinto, devis troviĝi monbiletoj por aboni nian gazeton. Sed, la mono malaperis! Jen mallonga rakonto pri nia naiveco kaj perdo de fido al poŝtistoj!

Verŝajne ĉiuj naciaj poŝtoj en la mondo havas la saman konsilon kaj averton al siaj uzantoj: NE SENDU MONON EN LĖTERO! Des pli, ĉar sendi monon en leteroj estas malpermesata kaj opiniata kiel punenda ago. En iuj landoj ĝi prezentas lezadon de devizaj kaj transpagaj leĝoj.

Malgraŭ ĉio ĉi, multaj uzantoj de poŝtaj servoj elektas tiun ĉi manieron por sendi malgrandajn monsumojn al siaj (eksterlandaj) amikoj. Kial do oni faras tion? Ekzistas kelkaj respondoj, sed ĉefe temas pri tro altaj tarifoj por sendi monon per uzo de kutima banka servo. Kelkaj ne ŝatas bankojn, aliaj ne uzas modernajn pagmanierojn, multaj eĉ ne pagas alimaniere ol per konkreta, kontanta mono.

Nia redakcio preferas bankajn pagojn, sed ĉar la jarabono estas relative malalta, tio ne ĉiam estas plej malmultekosta solvo.

Tamen, ĉar en daŭro de ne pli ol duonjaro malaperis la mono sendita al ni per ses diverslandaj leteroj, kaj en la sama periodo nur unu tia sendaĵo atingis nin, ni ne povas neglekti la aferon. Ni sendis nian plendon al la Kroata poŝto, kiu tuj afable respondis laŭ la ŝablona stilo, ke por sendi monon ekzistas aliaj manieroj, sed ke ili konsideros nian plendon kaj sendos ĝin al la poŝta kontrolservo.

Kompreneble, el nia plendo rezultis granda nenio! Malgraŭ la kontrola sistemo, la ŝtelistojn oni ne povis trovi. Krome, neniu povas garantii, ke la sendintoj vere enkovertigis la monon, kaj ke nia redakcio ne ricevis ĝin. Ĉio dependas de la fido!

Ekzistas du aferoj, kiuj renversis la fidon inter la poŝto kaj ĝiaj uzantoj. Unuflanke, la sendantoj ne obeis la regulojn de poŝta servo, kaj tio tuj komence eliminis la respondecon de la poŝto. Sed, aliflanke, la poŝto akceptis la respondecon por transporti la leteron de sendinto al adresato, kaj por ĝia sekura transporto ricevis pagon. Ĉu do la malobeo de la poŝtaj reguloj aŭtomate permesas al poŝtistoj malfermi niajn leterojn

kaj ŝteli monon el ili? Absolute ne! Sed, en ĉi tiu afero neniu povus juste juĝi, ĉar mankas pruveblaj faktoj:

- 1) ĉu la sendinto vere sendis la monon,
- 2) ĉu la adresato vere ne ricevis la monon,
- 3) en kiu el multaj poŝtaj interŝanĝnodoj povis eventuale malaperi la mono, kaj
- 4) kiu el la poŝtistoj tie laborantaj, povis ŝteli la monon?

Niaj urbaj poŝtistoj malafable diris al ni, ke ŝteli povis ankaŭ alilandaj poŝtistoj, antaŭ ol la koverto venis al Kroatio. Por esplori tion, ni sendis al ni mem el Zagrebo koverton kun mono. La mono malaperis! Ĉu tiu fakto estas nekontestebla pruvo, ke ŝtelas nur la kroataj poŝtistoj? Absolute ne! Sed ĝi indikas, ke la tuta poŝta sistemo estas nesufiĉe sekura. Tial do ni ne fidas al poŝtistoj!

Karaj legantoj kaj abonantoj, bonvolu por viaj pagoj elekti pli sekuran kaj facile kontroleblan sistemon. La banka servo estas relative sekura, sed iufoje multekosta. Ni ne neglektu ankaŭ la sistemon de poŝtaj mandatoj, kiuj estas same sekuraj kiel la banka mensendo.

Ĉi tiu artikolo celas atentigi vin, ke nia redakcio ne plu akceptos la respondecon por mono sendata en leteroj. Ni volas konservi la fidon inter vi, kiuj estas niaj legantoj kaj abonantoj, kaj ni, kiuj al vi ofertas certan servon, kiun vi bonvolis pagi.



LA 10-a KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO Redakcia kompilo



Intervjuo kun **BORIS DI COSTANZO,** prezidanto de la LKK

ZE: Estimata samideano Di Costanzo, ĉu vi povas klarigi la motivojn pro kiuj EEU decidis kongresi en Kroatio en 2014, kaj kial por la kongresurbo estis elektita Rijeka?

- EEU kontaktis nin kaj demandis, ĉu ni volas kandidatiĝi. EEU volas honori Kroatian okaze de ĝia aliĝo al Eŭropa Unio, kaj havi la sekvan kongreson ĝuste en la nova lando, kiu samtempe estas konata kiel lando kun forta Esperanto-movado. Ni konsultiĝis en la societo kaj akceptis la proponon. Tiam ni kontaktis la urbestron de Rijeka, kiu subtenis nian kandidatiĝon. La urbestro sendis oficialan invitleteron al EEU, kaj jen la kongreso!

ZE: Kiuj krom vi mem estas grave engaĝitaj kroataj esperantistoj en la kongresaj preparoj, kaj ĉu vi ricevis materian helpon aŭ financon subtenon de la urbaj aŭ regionaj aŭtoritatoj kaj instancoj de Rijeka?

- En la kongresaj preparlaboroj partoprenas nun la tuta membraro de la rijeka Esperanto-societo, kvankam en la preparfazo sufiĉas la laboro de la LKK, kiu konsistas el kvar membroj de la societo kaj du membroj de la urbo Rijeka disponigis la salonojn por la kongreso senpage, kaj la Departemento Primorsko-Goranska aprobis iom da mono por preparoj de la kongreso.

ZE: Kial la kongresa retejo ne montras liston de aliĝintoj? Kiom da kongresanoj vi atendas, kaj ĉu la ĝis nun aliĝinta nombro konfirmas viajn prognozojn?

- La kongresan retpaĝaron prizorgas EEU. Ĝis nun aliĝis 80 kongresanoj, kaj ni atendas inter 200 kaj 250 kongresanojn, kiom da ili kutime partoprenas en la kongresoj de EEU.

ZE: Ĉu vi povus mallonge skizi la ĉefajn detalojn pri la kongreso? Kie ĝi okazos, kion oni planas prezenti en ĝia programo, kio estas la kongresa temo?

- Ĉiuj necesaj informoj troviĝas en niaj reklamiloj kaj en la kongresa retejo ĉe: <http://eeu-kongreso.webnode.com>. Pliaj detaloj aperis en la lasta numero

de "Tempo" (n-ro 120, rim. red.). Kiel nia kongresejo servos "Kroata kulturdomo" en la strato Strossmayerova 1, apud la hotelo "Neboder".

ZE: Ĉu la kongresaj temoj tuŝos la lokon kaj rolon de unuopaj naciaj lingvoj kontraŭ la altrudema uzo de la angla. Ĉu oni diskutos pri la rolo de la kroata lingvo en la EU-sembleo? Kiuj esperantistoj el Kroatia partoprenos en la programo laŭ la anoncitaj temoj?

- La ĉefa kongresa temo estas "Justa Eŭropo kun justa lingva solvo". Do, ĝuste pri la lingva situacio en Eŭropo diskutos nia kongreso. Prelegos gravaj fakuloj el EEU, sed ankaŭ el kroataj universitatoj. En la diskutoj ĉiu kongresano povos kontribui al la temo ankaŭ per siaj demandoj pri la pozicio de la kroata lingvo inter la lingvoj de Eŭropa Unio.

ZE: Vi organizos ankaŭ la antaŭkongreson. Ĉu jam konatas la detaloj?

- La antaŭkongreson organizas aparta entrepreno el Zagrebo kaj ĉio pri ĝi troviĝas en la retejo: <http://eeu-kongreso.webnode.com/anta%C5AD-kaj-postkongreso/>.



ZE: *La ĉefa riproĉo de potencialaj kongresanoj estas la alta aliĝkotizo. Ĉu vi povus komenti tion?*

- La aliĝkotizon fiksas la estraro de EEU, ĉar temas pri la kongreso de EEU (samkiel la kotizojn de Universalaj Kongresoj fiksas UEA). La kotizoj estas principe kvaroble malpli altaj ol tiuj de UEA kaj kun la relative malalta nombro de kongresanoj ili apenaŭ kovras la programkostojn. Ĉar la financa helpo el Kroatio ne rilatas al la programkostoj, oni devas antaŭplani kovri tiujn kostojn per la kotizoj.

ZE: *Kion vi menciis kiel la ĉefan programeron de la kongreso? Kian utilon havos la landa Esperanto-movado pro ĝia okazigo en Kroatio?*

- La kongreson aŭspicias la prezidento de Kroatio prof. Ivo Josipović kaj la Departemento Primorsko-Goranska. Do, tre gravaj institucioj tiel agnoskas la Esperanto-movadon, kio helpas, ke la kongreso certe havu grandan reeĥon en la publikaj informrimedoj. Ĝi certe havos gravan valoron por ĝenerala informado kaj reklamado de Esperanto en Kroatio. Krome, la enlanda esperantistaro havos la okazon partopreni internacian aranĝon en propra lando. Kontraŭ nemulte da mono, praktiki la lingvon en la internacia etoso povos ankaŭ tiuj, kiuj ne havas monon por partopreni la UK-ojn.

ZE: *Kaj jen la demando kiu ne rekte rilatas la kongreson. Certe vi legis pri rifuzo de kelkaj landaj asocioj membri en EEU? Kiel vi komentis tion?*

- Laŭ mia scio, el la 28 landaj asocioj nur unu malaliĝis (Britujo!), kaj tuj aliĝis la plej nova (Kipro). Sekve, ne temas pri kelkaj landaj asocioj. Okazis debato pri tio, kaj ĉiuj krom Britujo subtenis la politikon de EEU kaj ĝian laborprogramon.

ZE: *Ĉu vi volas aldoni ion ĉe la fino?*

- Ni ĝojas pro la kongreso de EEU, kiu apud la IJK, okazinta en 1998, estos unu el la plej gravaj Esperanto-eventoj de la rijeka Esperanto-movado.

ZE: *Koran dankon ke vi akceptis respondi al niaj demandoj, kaj bonan sukceson al la kongreso!*

- Nedankinde, kaj dankon pro la kongresa bondeziro.

MESAĜO DE LA PREZIDENTO DE KROATIO

La 10-an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio, aŭspicias la prezidento de Kroatio, **s-ro Ivo Josipović**, kiu en sia letero al la organizantoj skribis: *"Mi utiligas ĉi tiun okazon por deziri al vi kaj viaj kunlaborantoj sukcesan organizon de la konferenco, kiu per sia temo pri justaj lingvaj rilatoj en Eŭropo, certe allogos fakan kaj pli vastan publikon."*

KROATA TAGO DUM LA EEU-KONGRESO

La *Kroata tago* okazos dimanĉe, la 6-an de julio 2014. Partoprenantoj de la Kroata tago ne pagas la kongreskotizon, sed nur la kostojn de la komuna tagmanĝo. Post la tagmanĝo, je la 14h00, en la kongresejo komenciĝos *Ronda tablo*, dum kiu oni diskutos pri Esperanto en Kroatio.

Vespere, je la 20h00, en la granda salono de la Kroata kulturdomo, okazos folkloro programo.

Por partopreni la Kroatan tagon en Rijeka, oni povas kunvojaĝi per trajno, kiu startos je la 7h50 en Zagrebo, kaj alvenos al Rijeka je la 12h35.



RIJEKA
6-a - 12-a de julio 2014

POLUDNICA 2014

  Adam Wilkus



La renkonto de vojaĝantoj kaj turistoj "Poludnica" (www.poludnica.esperanto.sk) okazis de la 4-a ĝis 6-a de januaro 2014 en Liptovský Ján en sudo de Slovakio. Partoprenis ĝin esperantistoj el Slovakio, Ĉeĥio, Pollando, Aŭstrio, Germanio, Francio, Ukrainio, Britio kaj Kroatio.

El la geografia vidpunkto **Poludnica** estas fino de norden celanta montodorso de **Malaltaj Tatroj**. Laŭ ĝi esperantistoj nomas la tradician vintran renkontiĝon de esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj, kiu okazas ekde 1983.

En la slovakia lingvo "Poludnica" signifas tagmezulinon (<http://eo.wikipedia.org/wiki/Tagmezulino>). Laŭ la slava mitologio ŝi estas malica demono aŭ feino ĉasanta tiujn, kiuj malatente restas tagmeze en la kampo. Tagmezulinaj fariĝas la animoj de tiuj virinoj, kiuj mortis dum aŭ tuj post la geedziĝo. Al renkontitoj ili starigas malfacilajn enigmojn, kaj de la respondo dependas la sorto de la demandito.

Tagmezulinaj prezentiĝas kiel junaj knabinoj aŭ maljunulinoj, tre palaj, vestitaj blanke, kun longaj malordaj haroj.

Kune kun mia edzino Markéta mi venis sabate frumatene al la montara urbeto **Liptovský Mikuláš**, kaj pro la bezono sufiĉe longe atendi la buson, ni promenis ĉe la proksima lago **Liptovská Mara**, admirante la belan naturon. Apud la lago situas geotermaj mineralaj banlokoj **Tatralandia** kaj **Bešeňová**, kaj loĝas interesaj birdoj. Revenante al la urbeto kaj preterpasante la unuajn domojn, ni ekaŭdis kaj ekvidis minace bojantan kaj saltantan **Alzacan ŝafhundon**. Sur la pordeto mi ekvidis etiketon kun la slovaklingva surskribo pri la hundo: "Atentu! Ĝi estas bona hundo, sed havas malfortajn nervojn".

La suno ekbrilis, estis sufiĉe varme, kaj la bonaj vetero kaj humuro akompanis nin.

Post alveno al **Liptovský Ján**, kune kun aliaj partoprenantoj de la renkonto, ni vizitis la novkonstruitan lignan vidturon sur montoflanko, el kiu ni rigardis la turisman vilaĝon de Liptova regiono. La freŝa montara aero refreŝigis nin. Vizito al kratero (banejo kun la nature varmigata akvo) donis alian eblecon por refreŝiĝi. La minerala akvo enhavas

sulfuron kaj la banado en ĝi utilas al la haŭto kaj helpas pri reŭmatismo kaj aliaj sanproblemoj.

Ni ankaŭ vizitis la antaŭ nelonge malfermitan interesan muzeon pri orminejo nomatan "Subtero sub turoj" (verŝajne de proksima preĝejo), kie eblas multon lerni pri laboro de ministoj kaj aliaj metiistoj, kaj mem elprovi siajn laborkapablojn. Tie oni uzas interesajn primitivajn ilojn, ekzemple etan olean lumigilon, plumon de ansero por skribi per inko, ilon por rompi ŝtonojn kaj memprodukti monerojn. Ekinterese min "Horváth štôľňa" ("koridoro de Kroato"), nomata tiel - laŭ familia nomo sufiĉe populara en Slovakio - honore al la speleologo, ministro kaj amiko de ĉiĉeronoj de la minejeto.

Posttagmeze okazis la solena malfermo de la renkonto de vojaĝantoj en la komunuma domo, kie la vilaĝestro donacis al la partoprenantoj libretojn pri turismaj vizitindaĵoj, ilustritajn per belaj bildoj. Oni interese prelegis prezentante fotojn kaj filmojn pri grimpado sur kelkajn plej altajn montopintojn de Eŭropa Unio: **Sinjal** en Kroatio kaj **Pico** en Acorio, kiu apartenas al Portugalio.



Kelkaj montgrimantoj rakontis pri grimrado sur la monton **Esperanza**. Alia preleganto prezentis faktojn kaj utilajn informojn pri edukado kaj Esperanto.

Dimanĉe frumatene preskaŭ ĉiuj partoprenantoj supreniris al la montopinto **Poludnica** (1549 metroj), kiun kovris la neĝo. La pinton atingis 41 personoj kaj unu hundo. Kelkaj grimpantoj alportis ŝtonojn el diversaj partoj de la mondo por kontribui al la konstruado de eta piramido tie. Ĉirkaŭ la montopinto troviĝas profundaj kavernoj en rokoj, kiuj povus servi kiel kaŝejo. La montaraj birdoj bele kantis. Dum la grimrado oni povis rigardi la belan panoramon de **Altaj Tatroj**, kaj en malproksimo vidiĝis la urbeto **Pribylina** kun la hotelo "Esperanto". Reveninte al **Liptovský Ján**, kelkaj grimpintoj ĝuis saŭnon kaj naĝejon en la proksima hotelo.

Dum la grimrado mi aŭdis Slovakojn paroli sian denaskan lingvon, kaj mi rimarkis, ke ili ofte finas la frazojn per la krivorto "hej", kiu tradukeblas kiel jeso. Dank'al tio mi ekkomprenis kial en Pollando oni ŝercas, ke montarano, kiu loĝas apud la pola-slovaka landlimo, neniam sukcesas dormigi sian bebon, ĉar li kantas

lulkanton jene:

*Jen en nigra noktobskuro
okuletoj fermas sin.
Endormiĝas la sciuro,
bebon lulas la patrin':
Dormu mia kara,
dormu jam karulo, hej!!!"*

Pro la ekkrio, la bebo ĉiam denove vekigis!

Por tiuj, kiuj ŝatus lerni la slovakon, mi rekomandas fari tion helpe de la paĝaro slovake.eu/eo/, kreita enkadre de la projekto **E@I**.

Vespere okazis prelego kaj kvizo (kun premioj) pri vojaĝo, interalie al Islando, kie pasintjare okazis la UK, Gronlando, Grekio, Kroatio kaj aliaj landoj, kaj ankaŭ pri flugilhavaj migrantoj, kiuj ĉiujare vizitas diversajn kontinentojn.

Lunde oni daŭrigis la prezentado per vojaĝraporto pri Lisbono. Oni prezentis ankaŭ vojaĝplanojn por 2014 kaj sciigis la partoprenantojn pri la plej interesaj Esperanto-aranĝoj, okazontaj en tiu jaro: la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka (Kroatio), Somera Esperanto-Studado en Nitra (Slovakio) kaj (por la unua fojo) en Moskvo (Rusio), montara renkonto sur Granda Ĉantorio kaj Esperanta Feriado en montaraj de Pollando.

Dum la aranĝo funkciis libroservo kaj oni prezentis noveldonitajn librojn.

Ĉar lunde en Slovakio oni celebris la tradician kristnaskan feston de la Tri Reĝoj, en proksima preĝejo okazis bela koncerto, kiun ni ĝuis kun granda plezuro. La kantistinoj (akompanataj de diversaj muzikaj instrumentoj) estis bele vestitaj en multkoloraj popolvestoj, kaj post la koncerto – kiun aŭskultis ankaŭ la vilaĝestro kun sia simpattia edzino – ili disdonis hejme bakitajn dolĉaĵojn, dezirante feliĉan jaron al ĉiuj.

Inter personoj kies vivoj rilatas al la regiono estis ankaŭ **Eduard Slavoljub Penkala (Peĉkala)**, kroata inĝeniero, inventisto kaj konstruktoro, aŭtoro de la unua kroata projekto de aviadilo, naskiĝita en tiutempe hungara urbeto **Liptovský Mikuláš**. Lia familio havis polajn kaj nederlandajn radikojn. Li estis aŭtoro de ĉirkaŭ 80 inventoj pri mekaniko, kemio, fiziko kaj aviadotekniko

La etoso de la renkonto, la bela naturo, vizitindaj lokoj kaj sanigaj mineralaj geotermaj akvoj plaĉis al ni tiel, ke ni volonte vizitos la regionon ankoraŭfoje.

“AZIA PALETRO” PREZENTITA EN ZAGREBO

 **Josip Pleadin**
 **Ivan Špoljarec**



Post prezento en Bjelovar, Sisak kaj Kroatia ekonomia ĉambro - Zagreba ĉambro, la ekspozicio “Azia paletro” de pentristo-esperantisto **Ho Song** el Koreujo, la 4-an de februaro estis malfermita ankaŭ en la **Kulturcentro Travno**, en la samnoma zagreba kvartalo. La gastadon de “Azia paletro” en Kroatio organizis Dokumenta Esperanto-Centro el Ĝurdevac, klopodante pliprofundigi kulturajn ligojn inter Kroatio kaj Koreujo, la du malproksimaj landoj, kaj dezirante al la kroataj artŝatantoj prezenti la pentraĵojn de konata korea esperantisto. La malfermon de la ekspozicio per sia ĉesto honorigis ankaŭ la oficistoj de la Ambasado de Respubliko Koreujo en Zagrebo, respektive ĝia administra oficisto fraŭlino **Junghyun Park** kun sia kolego. La ekspozicion, kiu estis vizitebla ĝis la fino de februaro, pretigis s-ino **Jadranka Krajina**, kaj pri la informmaterialoj zorgis **Ivan Špoljarec**.

KUC TRAVNO

KULTURNI CENTAR TRAVNO / Cultural Centre Travno

Tel.: +385 1 6601 626, +385 1 6692 574 / Fax.: +385 1 6601 619
Božidara Magovca 17, 10 010 ZAGREB, Hrvatska / Croatia

Zagreba Esperantisto 

NOVAJ SUKCESOJ EN BJELOVAR

Zdenka Polašek



DENOVE VERDA BJELOVAR

Kiam bjelovaraj esperantistoj en 2011 organizis la tre sukcesan 9-an kongreson de kroataj esperantistoj, oni eĉ ne povis imagi, ke tiom rapide reverdiĝos la urbo. Esperanto-societo en Bjelovar estis tre aktiva de 1909 ĝis la 1990-aj jaroj. Post la kongreso, la 10-an de septembro 2011, okazis la (re)fondkunveno, kaj de tiam la nova societo atingas enviindajn sukcesojn, malgraŭ la fakto, ke ĝi ne posedas propran societejon.

Pri sukcesaj aranĝoj de Bjelovara Esperantista Societo dum pasintaj jaroj vi jam povis legi en "Zagreba Esperantisto", kaj nun bonvolu informiĝi pri aktualaj novaĵoj.

JARKUNVENO

La 24-an de februaro 2014, en la restoracio "Ŝenoa", okazis nia jarkunveno, kiun krom

multnombraj societanoj, ĉeestis ankaŭ la prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo (KEL) **Judita Rey Hudeček**, kaj la prezidanto de la Kontrolkomitato de KEL **Anto Mlinar**. La ĉeestintoj multon aŭdis pri la sukcesoj dum 2013, kaj akceptis eĉ pli ampleksan laborprogramon por 2014.



PORKOMENCANTA KURSO

Unu el la plej gravaj taskoj, menciitaj en la Laborprogramo por 2014, estas renovigi la bjelovaran tradicion: amasigi kaj junigi la membraron. Dank' al monsubteno de nia societano, en Bjelovar komenciĝis porkomencanta Esperanto-kurso por 15 diversaĝaj kursanoj, kiuj jam esprimis sian deziron partopreni poste ankaŭ perfektigan kurson.

DEKLAMKONKURSO

Dum la aranĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", okazonta septembre dediĉe al Tago de la urbo Bjelovar, ankaŭ ĉi-jare Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) el Zagrebo kaj Bjelovara Esperantista Societo kunorganizos la 21-an de septembro "Deklamkonkurson" (pli detalan informon bonvolu legi sur la paĝo 9).

Ĉi-jare oni deklamos originalan Esperantlingvan poezion, kaj tradukitajn poemojn de forpasinta bjelovara esperantisto kaj verkisto **Željko Sabol**.



TRADUKPROJEKTO

Ni povas fieri, ke eĉ kvaronon de la grupo, kiu dum la pasintaj 14 monatoj tradukadis la libron "De Patagonio ĝis Alasko" de fama esploristo, vojaĝkronikisto kaj amiko de bjelovaraj esperantistoj Tibor Sekelj, konsistigis membroj de Bjelovara Esperantista Societo. Ses niaj societanoj tradukis entute dek ĉapitrojn de tiu libro. La granda projekto estas finita, kaj oni planas publike prezenti la libron ankaŭ en Bjelovar. (Pli detale pri la projekto bonvolu legi sur la paĝoj 10 kaj 11).

ILEI-KONFERENCO EN BJELOVAR?

La malgranda urbo Bjelovar dum la periodo inter la fondiĝo de Esperanto-societo (1909) kaj ĝia estingiĝo, estis "la plej Esperanta urbo" en la tiama ŝtato. En tiu "verda" urbeto preskaŭ ne ekzistis familio sen almenaŭ unu esperantisto. Tion ebligis senĉesa multjara instruado de Esperanto kaj multaj profesiaj instruistoj, kiuj esperantistiĝis dum la kursoj, perfektigis en la pedagogiaj seminarioj en Primošteno, kaj poste mem gvidis kursojn en siaj lernejoj.

Pasintjare Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) kaj Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) proponis al ILEI, ke unu el la venontaj instruistaj konferencoj okazu en Kroatio. En tiu propono ne estis menciita la urbo en kiu la konferenco okazus, sed nun Bjelovar fariĝis la kandidato. La departementestro kaj urbestro sendis al ni invit-leterojn, kaj la Departemento Bjelovar-Blogora finance subtenis la kandidatigan kampanjon. Dank' al tio ni eldonis invit-prospekton, kiun ni distribuos al ĉiuj partoprenantoj de la ĉi-somera ILEI-konferenco en Montevideo (Urugvajo) kaj Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero (Argentino). Ni preparas

Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto kaj Bjelovara Esperantista Societo invitas vin partopreni en la

2-a DEKLAMKONKURSO
la 21-an de septembro 2013 en Bjelovar

La deklamkonkurso estos parto de la programo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", okazonta honore al Tago de la urbo. Partopreni povas junaj esperantistoj, lernantoj de elementaj kaj mezlernejoj el Kroatio kaj ankaŭ el aliaj landoj.

Temo: deklamado de originala Esperanta poezio kaj kroata poezio tradukita en Esperanton, kun akcento sur la poezio de bjelovara poeto kaj esperantisto Željko Sabol (1941-1991).

- Premioj:** 1. Pokalo al plej bona deklamanto
2. Medaloj
3. Libropremioj kaj
4. Diplomoj por ĉiuj partoprenantoj

La deklamadon prijuĝos ĵurio konsistanta el tri membroj, kiujn nomumos la organizantoj.

Bjelovara Esperantista Societo organizos senpagan tagmanĝon por ĉiuj deklamantoj, kaj la vojaĝkostojn pagos la partoprenantoj mem. Deklamantoj povas esti individuaj esperantistoj aŭ/kaj literatur(em)aj grupoj gvidataj de plenkreskuloj.

Aliĝojn bonvolu sendi al:

Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto, ĉe Marija Jerković
Jarunska 6, 10000 Zagreb; mjerkovic@net.hr

ankaŭ komputilan projekcion por la montevidea konferenco, per kiu ni volas klarigi kial Bjelovar estas rekomendinda loko por la instruista konferenco.

KUNLABORO KUN INVALIDA ASOCIO

Por (precipe junaj) membroj de la Asocio de fizikaj invalidoj de Bjelovar, Bjelovara esperantista societo organizos Esperanto-kursojn kaj aliajn programojn, per kiuj DEB deziras "malfermi novan fenestreton" al la invalidoj, por ke ili fariĝu "civitanoj de la mondo", kaj trovu novajn amikojn eksterlande.

INFORMMEDIOJ

La lokaj gazetoj "Bjelovarac" kaj "Bjelovarski list"

kaj la radio-stacio "Radio Terezija" regule informas la loĝantaron pri niaj aranĝoj (bonvolu vidi la ĉinumeran rubrikon "Publike pri Esperanto", paĝo 31).

NIA RETEJO

Pliajn informojn pri DEB, vi povas trovi en nia retejo: <http://www.ipernity.com/home/250888>

KUNLABORANTOJ

Tre sukcese DEB kunlaboras kun la Urbo Bjelovar, Departemento Bjelovar-Bilogora, urba kaj departementa Turismaj asocioj, Popola biblioteko "Petar Preradović" kaj Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, al kiuj ni tre dankas por ĉiaspeca helpo.

KOMUNA TRADUKPROJEKTO, KIU SUPERIS LA ATENDOJN

Pli ol unu jaro estis bezonata por fini la internacian tradukprojekton de la verko de **Tibor Sekelj "De Patagonio ĝis Alasko"**, en kiu partoprenis 25 tradukantoj kaj du provlegantoj el Kroatio, Serbio, Kanado, Pollando kaj Hungario. El Kroatio partoprenis 18 tradukantoj el 8 urboj (**Franjo Forjan, Grozdana Grubišić-Popović, Nenad Margetić, Zdenka Polašek, Berislav Rubčić** kaj **Ljerka Stilinović** el Bjelovar, **Đivo Pulitika** el Dubrovnik, **Mihaela Cik, Josip Pleadin, Nada Pleadin** kaj **Zdravko Seleš** el Đurđevac, **Ivica Šćepanović-Truto** el Humac, **Stanko Rukelj** el Majerje, **Emilija Obradović** el Nova Gradiška, **Mila Bečka** el Rab, **Davor Grgat** el Split, **Marija Jerković** kaj **Radenko Milošević** el Zagrebo), kaj el Serbio 6 tradukantoj el 3 urboj (**Dimitrije Janičić, Tereza Kapista** kaj **Zlatoje Martinov** el Beogrado, **Radojica Petrović** el Čačak, **Đorđe Dragojlović** kaj **Ivan Kujundžić** el Subotica). Krom ili partoprenis kroata esperantistino **Zdravka Metz** vivanta en Montrealo (Kanado). La provlegantoj estis **Tomasz Chmielik** el Świdnik (Pollando), kaj **Erzsébet Székely** el Szeged (Hungario). Kvin aliaj tradukantoj (el Kroatio, Slovenio kaj Nederlando), kiuj en la komenco aliĝis, rezignis pro diversaj privataj kaŭzoj aŭ malfacileco de la transprenita tasko.

"*De Patagonio ĝis Alasko*" estis originale verkita en la serba kaj, kvankam finverkita en 1985, ĝi neniam aperis en la originalo, sed publikigis nur parte en la hungara traduko de **Géza Vukovics**.

Eble la tradukon de tiu libro pli rapide kaj sen tioma streĉo povis fari unu bone trejnita tradukanto! Eble! Sed, tiam ĝi estus ordinara traduklaboro! En nia tradukprojekto ni celis doni la ŝancon al multaj personoj elprovi siajn kapablojn kaj labori kolektive por firmigi nian unuecon.

Josip Pleadin



En januaro 2013 naskiĝis la ideo pri komuna tradukado de la verko en Esperanton. "Grafokom" el Đurđevac deziris publikigi la verkon jam en 2013, kiam oni omaĝis la aŭtoron okaze de la 25-a datreveno de lia forpaso. Kvankam rapide kolektiĝis granda teamo de tradukantoj, multaj alfrontitaj problemoj bremsis la transprenitan taskon.

La unua problemo montriĝis la malfacile legebla manuskripto. Ĝi estis skanita kopio

de la originala tajpajo, en kiu la tradukantoj devis multloke deĉifri vorton post vorto.

Kiel dua grava problemo montriĝis la specifa lingvaĵo kaj buntaj frazkonstruoj de Tibor, al kiuj ne tuj povis adaptiĝi niaj tradukantoj, kiuj antaŭe tradukis nur sporade. La trian problemon prezentis multnombraj personaj kaj geografiaj nomoj uzataj en ĉiu el la 41 ĉapitroj de la libro. Al ordinara leganto tiuj nomoj plejparte estas tute aŭ nesufiĉe konataj. Por unueciĝi la tradukon, oni uzis la geografiajn esprimojn kiuj jam troviĝas en PIV, kaj la aliajn oni klopodis Esperantigi, kun nura escepto de kelkaj plej malgrandaj kaj ĝenerale nekonataj lokoj. Por la personaj nomoj, kiujn la aŭtoro uzis en la fonetika formo, kutime uzata en la serba lingvo, oni devis trovi la originalajn formojn, kiuj estas pli akcepteblaj inter esperantistoj. Nur kelkajn ĝenerale konatajn historiajn nomojn la tradukantoj uzis en la Esperanta formo. La lingvan unuecion de la tradukoj faris la redaktoro, kiu ankaŭ kompilis la 25-paĝan glosaron, sen kiu la legado de tiu ĉi impresa libro pri Ameriko ne estus ebla. Pro ĉio ĉi ankaŭ la amplekso de la libro kreskis de la planitaj 200, al 250 paĝoj.

La finan poluradon de la tradukoj faris nia pola kunlaboranto Tomasz Chmielik, kaj la lastajn erarojn plukis s-ino Erzsébet Székely.

La 8-an de aprilo 2014, dekkvar monatojn post starto de la projekto, la redaktoro dissendis cirkuleron al ĉiuj kunlaborantoj, ke la libro estas fintradukita kaj enpaĝigita, kaj la 17-an de aprilo la libro estis finpresita.

La tradukantoj dum la projekto spuris la aventurojn de la aŭtoro, kunvojaĝante de la plej ekstrema sudo de Sud-Ameriko, ĝis nordo de Nord-Ameriko. Ne malpli granda aventuro estis navigado tra nia lingvo, serĉante konvenajn vortojn. Multfoje temis pri specifaj amerikaj esprimoj, historie ligitaj al malnovaj popoloj, por kiuj oni devis enkonduki neologismojn, ĝis nun neuzitajn en Esperanto. En la komenco ekzistis dubo ĉu Esperantigi geografiajn nomojn, sed, ĉar multaj jam ekzistis en la kutima lingvouzo, ni decidis uzi la Esperantajn formojn, dum en la glosaro ni notis ankaŭ la originalajn. Por personaj nomoj ni uzis la originalajn (aŭ latinigitajn) formojn, male al la skolo de Richard Schulz, kiu proponis Esperantigi eĉ tiujn. Sed tie la aventuro ne finiĝis, ĉar ni devis trovi la originalajn formojn pro la fakto, ke la serba lingvo, la lingvo de la originalo, uzas la fonetikan transskribon de geografiaj kaj personaj nomoj.

Pro la komplikeco de la laboro, ni ne sukcesis eldoni la libron en la jaro de la 25-a mortodatreveno de la aŭtoro. Sed ni ne malĝoju! Ĉu ekzistas pli bona tempo kaj loko por prezenti ĝin, ol estas la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos ĉi-jare en Bonaero, la ĉefurbo de Argentino? Bonaero estas la hejmurbo de Tibor. Dum multaj jaroj li vivis kaj verkis tie, kaj, finfine, li kunfondis la landan Esperanto-asociacion. Ameriko konas Tiboron same kiel li konis ĝin. Tiu

amikeco meritas esti kronita per la nova libro de Tibor, eĉ se ne temas pri omaĝo dum ronda datreveno.

Ni devas esprimi nian dankon ankaŭ al UEA, kiu (antaŭ) mendis kvanton da noveldonitaj libroj, por povi oferti ilin, ankoraŭ odorantaj je presfarbo, al la bonaeraj kongresanoj.

Ni devas danki ankaŭ al s-ro **Orlando Raola**, la prezidanto de la usona landa asocio, kiu tre entuziasme akceptis la taskon prezenti la libron en la programo "Libro de la jaro", kiu konigas al la kongresanoj la plej novajn kaj la plej interesajn eldonaĵojn.

Kaj kion ni konkludu post ĉi tiu traduka aventuro? Eble la tradukon de tiu libro pli rapide kaj sen tioma streĉo povis fari unu bone trejnita tradukanto! Eble! Sed, tiam ĝi estus ordinara traduklaboro! En nia tradukprojekto ni celis doni la ŝancon al multaj personoj elprovi siajn kapablojn, labori kolektive por firmigi nian unuecon, kaj por instigi nin pripensi la staton de niaj lingvaj konoj. Mi devas citi la konatan hungaran/luksemburgan esperantiston kaj profesionan tradukiston/interpretiston **István Ertl**, kiu por la "Revuo Esperanto" diris: *"Se rigardi la mezan nivelon de lingvano, oni povas havi la impreson, ke la posedantoj iom mistraktas sian posedajon"*. Li volis diri, ke averaĝa esperantisto nesufiĉe bone regas la lingvon, kiun li uzas. La lingva pliperfektigo kaj kapablo de niaj membroj estas pli ol necesa. Tial la projektoj similaj al tiu ĉi, estas nepre bezonataj kaj utilaj. Kiel ni havos bonajn tradukantojn kaj interpretojn, se ni ne donas al ili praktikan eblecon plibonigi siajn kapablojn?

Arigi tridekon da homoj ĉirkaŭ unu projekto oni ne povas facile. Guste tial la ĵus finiĝinta komuna tradukprojekto valoras pli multe ol nur la eldonita libro. Ĝia sukceso donas entuziasmon por similaj novaj projektoj, ĝi spronas

nian deziron fari ion por Esperanto en la epoko, kiu al ĝi ne estas aparte inklina. La projekto plantis en ni la semon de kunlaboro kaj estonta amikeco. Tial ne mirigas, ke kelkaj tradukantoj jam esprimis sian deziron partopreni en novaj tradukprojektoj, aliaj proponis, ke ni ĉiuj kolektiĝu kaj interkonatiĝu, ke ni organizu seminarion por tradukantoj, ke ni diskutu pri la spertitaj tradukproblemoj, kaj ke ni faru konkludojn rilate la evoluon de nia lingvo. Estas tute klare, ke la lingvo evoluas nur se oni uzas ĝin. Elprovaĵo de sia lingvo per tradukado praktikis ankoraŭ ĝia aŭtoro, ĉar por esprimi ĉiujn nuancojn de naciaj lingvoj tradukataj al Esperanto, ne sufiĉas nur bona vortaro. Pli ol la vortaro estas bezonata ĉiama praktikado, senĉesa notado de novaĵoj, neologismoj, konstanta polurado de la stilo. Kelkaj homoj opinias, ke Esperanto devas esti traktata kiel ĉiu alia varo. Mi profunde esperas, ke tio neniam okazos en plena senco de tiu vorto. Sed, ke Esperanto ĉiam estos ia varo, tio jam nun estas tre certa. Kiu aĉetus varon kun evidentaj kvalitmankoj? Certe neniu! La kvalito de Esperanto ne estas memkomprenebla, sed la ĝin oni plibonigas per nia senĉesa verka kaj traduka laboro. Same kiel majstra metiisto superas la nesufiĉe trejnitajn metilernantojn, ankaŭ trejnita tradukanto donos pli bonan rezulton ol ordinara esperantisto. Sed antaŭ ol fariĝi majstro, ĉiu devas esti metilernanto!

Nia projekto montris, ke ni povas plibonigi nian lingvan scion, kaj ke ni devas vekigi el letargio kiu okupas nin. Ĉiu el ni legu librojn kaj gazetojn, ĉiu klopodu traduki aŭ verki, kaj siajn verkojn sendi al konkursoj aŭ al redakcioj de gazetoj por publikigo. Ne forgesu ke "Zagreba Esperantisto" ekzistas ĝuste por esti via tiusenca helpanto.

MONUMENTA SERBA VORTARO

Josip Pleadin

Anchoraŭ en antikva tempo homoj klopodis konservi la riĉaĵojn de propraj lingvoj. Ju pli evoluinta estas iu lingvo, des pli ĝi bezonas vortarojn, kiuj sisteme notas vortoprovizon, aŭ difinas vortosignifojn per iu alia lingvo. Kvalitaj vortaroj servas kiel konsultlibroj al lernantoj, legantoj, tradukantoj ... Vortaroj akompanas ankaŭ la ekeston kaj evoluon de Esperanto. "Grandaj Esperantaj nacioj" kompilis ampleksajn vortarojn relative frue, sed "malgrandaj" bezonis jardekojn por proksimiĝi al tiu celo.

Nun antaŭ ni troviĝas la ampleksega 680-paĝa "Esperanta-serba vortaro" de la konata beograda esperantisto **Dimitrije Dišo Janičić**. Ĝi aperis en 2013, kaj per tio je 4-5 jaroj ĝi postrestas la ambaŭdirektajn kroatajn vortarojn de **Lucija Borčić**, kiuj iasence estis inspiraj ankaŭ por la aŭtoro Janičić.

Kvankam en Serbio ekzistis pli frue eldonitaj vortaroj, neniu el ili laŭ sia amplekso similis la vortaron de Janičić. La antaŭaj vortaroj de **Stevan Živanović**, **Marinko Gjiwoje**, **Antonije Sekelj** kaj aliaj malpli ampleksaj, eĉ en la tempo de sia apero ne sufiĉis por la kreskantaj bezonoj de serbaj esperantistoj, kaj estis kompilitaj nesufiĉe profesie. Tial la aperon de la vortaro de Janičić ni povas nomi **epokfara**, kaj la verkon mem **monumenta**.

La vortaro de Janičić sekvas la kutimajn vortaristajn principojn. Komence troviĝas la enkonduko de la aŭtoro, sekvas mallonga prezento de la Esperanta prononcado kun serbaj specifajoj, listo de vortaroj uzitaj dum la kompilado, listo de mallongigoj,

kaj ĉe la fino estas la registro de proksimume 4.500 serbaj vortoj kun difinoj.

La vortaro de Janičić, male al la antaŭaj vortaroj, uzas la kirilan skribon, kiu estas la origina skribo de la serba lingvo. La verko aperis ĉe la beograda eldonejo **Orion-art** en la vortara libroserio (libro n-ro 3), do la eldono per nenio malsimilas la kutimajn nacilingvajjn vortarojn, respektive ĝi estas profesie produktita. Ĉi tiu eldono eliminis ankoraŭ unu econ de la antaŭaj vortaroj. Ili uzis la iaman serbo-kroatan lingvan varianton, kiu estis kutima dum la ekzisto de la iama komuna ŝtato Jugoslavio. En la vortaro de Janičić, la serbaj esprimoj estas "pli puraj", pli konsekvencaj al la origina serba lingvo.

Plena Ilustrita Vortaro (2005) servis kiel la modelo ankaŭ por la vortaro de Janičić. Kvankam li komencis verki la vortaron kelkajn jarojn pli frue, Janičić ne kaŝas la fakton, ke la kroataj vortaroj de **Lucija Borčić** multe helpis al li, aparte rilate la nomojn de marbestoj.

La manuskripton de Janičić kontrolis tri gravaj serbaj esperantistoj: **prof. d-ro Miodrag Stojanović**, **d-ro Pribislav Marinković** kaj **m-gro Zlatoje Martinov**. La vortaro enhavas ĉirkaŭ 16.500 bazajn vortojn kaj ĉirkaŭ 47.000 leksikajn unuojn.

Malsame ol la vortaroj de **Lucija Borčić**, la vortaro de Janičić enhavas ankaŭ geografiajn kaj proprajn nomojn (de urboj, regionoj, landoj, historiaj personoj), kiuj ekzistis ankaŭ en la manuskripto de **Borčić**, sed la aŭtorino forigis ilin por redukti la amplekson de la



vortaro. Samas ĉe ambaŭ aŭtoroj la uzado ankaŭ de ne-PIV-aj vortoj, kiuj ĉe ambaŭ estas notitaj per asterisko (*).

Ĉar la enhavo de tiu ĉi vortaro per nenio postrestas la vortarojn de aliaj nacioj, ni povas aserti, ke per ĝia eldono la serbia movado fari grandan salton antaŭen, kvazaŭ per tempomaŝino.

Komparante la vortaron de Janičić kun la antaŭaj serbaj vortaroj, ni rimarkas, ke la difinoj estas pli adekvataj, pli precizaj, kaj la vortoprovizo nekompreneble pli granda. Samkiel **Borčić**, ankaŭ Janičić komprenis, ke bona vortaro devas ne nur trovi ekvivalentajn serbajn esprimojn por klarigi unuopajn kapvortojn, sed ke nepre oni devas pli amplekse priskribi ilin, menciante multloke ankaŭ sciencajn kaj fakajn esprimojn, precipe latinlingve, por ke ne aperu dubo pri kio temas.

Tiu ĉi vortaro sendube estos uzata de pluraj generacioj de serbaj esperantistoj, ĉar tiom ampleksaj vortaroj postulas multege da laboro kaj mono, kio jam anticipe malfaciligas preparadon de

STARTAS KONKURSO POR NIAJ KUNLABORANTOJ

✍ Radenko Milošević

Ekde ĉi tiu numero de "Zagreba Esperantisto" startas konkurso por niaj kunlaborantoj-jurnalisto! En ĝi partoprenos ĉiu aŭtoro de teksto publikigita en nia revuo dum 2014, kun la escepto de ĉefa kaj plenumredaktoro. Pri la detaloj bonvolu informiĝi en la ĉi-

suba sciigo pri la Premio "Degenio velebita", kiun nia redakcio atribuos al la plej sukcesa kunlaboranto ĉiujare okaze de Zamenhofa tago.

La celo de ĉi tiu konkurso estas motivigi la legantojn kaj abonantojn skribi pri diversaj temoj, aŭ reagi pri la legitaj artikoloj, kio

pliriĉigos nian revuon, kaj faros ĝin pli alloga, pli respondeca al la bezonoj kaj deziroj de siaj legantoj. Ni volas kontesti la opinion, ke en Esperanto oni verkas nur pri Esperanto, kaj jen ni disponigas al vi niajn paĝojn por temoj elektitaj ankaŭ de vi mem.



Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj

establas la premion

Premio "Degenio velebita"

Degenio velebita (lat. *Degenia velebitica*) estas floro, unu el la plej maloftaj endemiaj specioj en Kroatio, severe protektita, simbolo de la plej alta kroata montaro *Velebit*. Ĝi troviĝas sur la reverso de la 50-lipaa monero.

La Premion "Degenio velebita" establas UZE kiel iaspecan ĵurnalistan premion por kunlaborantoj de "Zagreba Esperantisto" kaj la portalo www.zagreba-esperantisto.hr.

La Premion "*Degenio velebita*" ĉiujare atribuos la redakcio de "Zagreba Esperantisto" al la plej aktiva artikol-verkanto en difinita unujara periodo. La Premio estos aljuĝata laŭ la kvanto kaj kvalito de aperintaj artikoloj, kaj proklamata okaze de Zamenhofa tago. La unuan fojon ĝi estos proklamita en decembro 2014.

Partopreni en la konkurso povas ĉiuj legantoj, kunlaborantoj kaj membroj de la redakcio, escepte de la ĉefa redaktoro kaj plenumredaktoro. Ankaŭ la legantoj povas sendi siajn proponojn por la plej bona kunlaboranto.

La Premio estas honora, kaj konsistas el respektiva diplomo. Laŭ eventuala decido de la redakcio, la Premio povas konsisti ankaŭ el materia aŭ mona rekompenco.

simila eldono en baldaŭa estonteco. Laŭ la spertoj de Kroatoj post apero de la vortaroj de Lucija Borčić, ankaŭ la vortaro de Janičić sendube plibonigos averaĝan lingvoscion de serbaj esperantistoj. Iam mi skribis, ke neniuj vortaro estas perfekta. Ankaŭ ĉe Janičić ni povus trovi kritikindaĵojn, sed ĉu vere temas pri mankoj? Pro la lingva evoluo, kiu nepre altrudas novajn esprimojn,

ni ĉiam devas rigardi la lingvon kiel vivantan organismon. La tasko kompletigi ĉi tiun vortaron iom post iom per novaj esprimoj, per neologismoj kaj aliaj necesaj vortoj, ĉefe ne troviĝantaj en PIV kiu estas la vortara Biblio, restos ĉe estontaj generacioj de serbaj esperantistoj. Sed, Janičić povas fieri, ĉar li faris nemezureblan komplezon al Esperanto-movado

en Serbio. Espereble li povos ripeti la sukceson de Lucija Borčić, finpretigante ankaŭ la inversan, serba-Esperantan vortaron, ĉar tiun oni eĉ pli bezonas. En kompletigado de la Esperanta-serba vortaro de Janičić, oni koncentriĝu al derivitaj kaj kunmetitaj vortoj, kiuj mankas en preskaŭ ĉiuj Esperantaj vortaroj, kaj al specifaj esprimoj de sia kulturo, lando, regiono ktp.

PREMIO CIGNO AL KEL - ĈU LAŬMERITE?

 Josip Pleadin

"*Fondaĵo Cigno* estis kreita la 15-an de decembro 2012 kun la celo premi Landan Asocion ene de Eŭropa Unio, kiu aktivis en la landa informado nacilingve. La ĝisnunaĵaj premioj estis Esperanto-Asocio en Britio, Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj ĉi-jare Kroata Esperanto-Ligo. La Prezidanto estas mia filino Ayako Kawakita."

"*Fondaĵo Cigno* hieraŭ (la 15-an de marto, *rim. red.*) aljuĝis *Premion Cigno 2014*. La venkinto estis *Kroata Esperanto-Ligo*, kiu raportis pri 91 elpaŝoj en la amaskomunikiloj. Ilia dosiero estis riĉenhava. Gratulon! La premio estas aljuĝita al Esperanto Landa Asocio, kiu elstare informis pere de amaskomunikiloj en ilia nacia lingvo."

La du citaĵojn ni prenis el la fejsbukaj komentoj de s-ro Etsuo Miyoshi, japana industriisto, posedanto de la kompanio "Swany" (Cigno), de kiu certe ankaŭ la premio de li atribuita ricevis la saman nomon.

Se iu estas premiita laŭmerite, tiam oni devas vere ĝoji. Sed, en la kazo de KEL, ni devas esti iomete skeptikaj.

S-ro Etsuo Miyoshi skribis pri 91 artikoloj kaj elsendoj, kiujn menciis KEL en sia listo. Mi vere dubas ke KEL mem realigis tiom ampleksan informadon, eĉ se la listo ne estas publike konata.

Certe devas temi pri artikoloj kaj elsendoj, kiujn realigis ĉiuj kroataj Esperanto-societoj kaj unuopaj aktivuloj dum 2013.

Jam tre malnova kutimo de KEL estas preni la meritojn de siaj societoj kaj aktivuloj kiel siajn proprajn, pri kio trafe atentigis ankaŭ Sanja Damjanić en sia retmesaĝa

ĉirkulero al kroataj esperantistoj. Sen profunda pripensado tia sinteno de KEL povas ŝajni logika. Logika ĝi estus, se KEL havus inspiron kaj motivigan rolon, kaj se ĝi sisteme evoluigus la informadon. Logika ĝi estus, se KEL iel ajn planus, instigus aŭ helpus tiajn aktivecojn de siaj membroj kaj societoj. Sed tia logiko ne regas en KEL! Kiel landa asocio, KEL plurfoje publike deklaris pere de siaj organoj ke, se iu volas fari ion, tiu mem trovu homojn, financajn kaj aliajn rimedojn. Sed kiam la afero realiĝas, KEL tre akurate tiujn sukcesojn nombras kiel sukcesojn de la tuta organizaĵo, ĉar societoj kaj unuopuloj estas ĝiaj membroj.

Ĉe KEL do ekzistas du mezuriloj: unu, kiu lasas la aktivulojn labori solaj, kaj la alia, kiu alproprigas iliajn rezultojn, por prezenti KEL kiel sukcesan organizaĵon antaŭ ŝtataj institucioj kaj ĝenerala publiko. Per tia labormaniero KEL ĉerpas vivosukojn el siaj societoj, kiuj malfacile funkcias sen bezonataj financoj, ĉefe konsistantaj el membrotitizoj.

Eĉ se ni opinius, ke la *Premio Cigno* estas laŭmerite atribuita al KEL, ĉu ne estus dece, ke KEL reinvestu la premian sumon en la samajn aktivecojn, por kiuj la premio estas ricevita? Ĉu ne estus honeste la financon rezulton dividi kun la aktivuloj, per kies engaĝiĝo KEL sukcesis akiri la *Premion*?

Senkonsidere pri ĉio ĉi, ni devas danki al s-ro Etsuo Miyoshi pro la malavara subteno de Esperantaj organizaĵoj, sed ni devas tre serioze pensigi lin: ĉu tiamaniere atribuita premio agnoskas la laboron de la plenumantoj de la informa



S-ro Etsuo Miyoshi



S-ino Ayako Kawakita



laboro, kaj ĉu la mono tiel disdonata vere rezultas per ia konkreta frukto? Ambaŭ demandojn, bedaŭrinde, mi devas respondi per "ne"! Principe nek unu, nek la alia afero estas nia zorgo, ĉar temas pri privata mono de bonvolema mecenato, sed nelaŭmeritaj premioj elvokas malsimpatiojn eĉ se temas pri ĝenerale pozitivaj kaj bonintencaj agoj.

Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), konforme al sia laborprogramo, anoncas renovigon de *Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"*, lanĉita de la iama *Zagreba Esperanto-Ligo*, kun la celo stimuli ĉiaspecan literaturan kreadon en Esperanto, por malkovri literaturajn talentulojn kaj konigi iliajn verkojn en Esperantujo per premio kaj publikigo en "Zagreba Esperantisto" aŭ libroforme.

UZE anoncis ĉi tiun konkurson okaze de pasintjara *Zamenhofa tago*, kiu dekomence estis opiniata *Tago de Esperanta libro*.

UZE invitas ĉiujn literaturemulojn de Esperantujo partopreni en la jenaj konkursaj branĉoj: **1) Originala prozo.** (inkluzive de teatraĵoj). Maksimuma longo de konkursaĵoj nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj.

2) Originala poezio. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj poeziaj formoj.

3) Tradukaĵoj el la kroata. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70

jaroj aŭ de tiuj, kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpaga publikigi iliajn verkojn.

3) Tradukaĵoj el aliaj lingvoj. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70 jaroj aŭ de tiuj, kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpaga publikigi iliajn verkojn.

Konkursi povas nur la ĝis nun nepublikigitaj verkoj, aŭ la verkoj kiuj aperis en interreto. Ĉiu konkursaĵo estu aparta *word* aŭ *pdf*-dokumento, subskribita per pseŭdonimo kaj alkröĉita al la retmesaĝo, en kiu estu skribita la vera nomo de la aŭtoro/tradukinto kaj lia/ŝia retadreso. UZE elektos la ĵurion kiu prijuĝos ĉiujn ricevitaĵojn konkursaĵojn. Laŭreatoj estos premiitaj per diplomoj kaj libropremioj. UZE retenos dum unu jaro la ekskluzivan rajton publikigi ĉiujn premiitajn (kaj nepremiitajn) konkursaĵojn en "Zagreba Esperantisto" aŭ en apartaj libretoj.

Konkursajojn oni sendu antaŭ la 31-a de oktobro 2014 rete al zagreba.esperantisto@gmail.com.

PRELEGO EN Miĉo Vrhovac MEDICINA LERNEJO



Gelernantoj kiuj partoprenis la prelegon

La 26-an de februaro la loka Esperanto-societo "La Mondo" organizis prelegon titolitan "Esperanto - ponto inter homoj" en la Medicina mezlernejo de Banja Luka (Bosnio-Hercegovino). Al ĉirkaŭ 40 gelernantoj kaj profesoroj prelegis la vicprezidanto de la societo *Miĉo Vrhovac*, kiu parolis pri la historio de Esperanto kaj ĝia rolo en fortigo de interhomaj ligoj. Ĉe la fino la partoprenintaj profesoroj kaj gelernantoj interparolis kun la prelaganto kaj esprimis la deziron lerni la Internacian lingvon. Profesorino de la serbaj lingvo kaj literaturo *Aleksandra Tatić*, kiu helpis organizi la prelegon, interkonsentis kun la societaj vicprezidanto *Miĉo Vrhovac* kaj la kasistino *Ljiljana Slavnić* daŭrigi la kunlaboro dum sekvontaj jaroj, pri kio oni planas subskribi koncernan protokolon.

Pri la prelego kaj kurso, kiu startis en marto, raportis ankaŭ la retejo de la Medicina mezlernejo.



VARAŽDIN - PIERLO INTIER URBOJ DJE IJA MINDO

 *Snježana Habulin*

La usona gazeto *New York Times* kun ĉirkaŭ dumilion-ekzemplera eldonkvanto, antaŭ nelonge proklamis la urbon *Varaždin* perlo inter urboj de la mondo kaj plej dezirinda vojaĝcelo en 2014, rekomandante, ke oni vizitu ĝin. Pro la rekomendo, tiu pitoreska urbo kun ok jarcentojn longa historio, trovis sin sur la listo de 50 plej dezirindaj mondaj turismaj vojaĝceloj. Merita por tia honoro verŝajne estas la varaždina "Promenfesto" (*Špancirfest*), konata kiel festivalo de bonaj emocioj, kiu komenciĝis antaŭ 15 jaroj, kaj ĝis nun altiris preskaŭ tri milionojn da vizitantoj, artistoj, strataj amuzistoj kaj muzikistoj el la tuta mondo.

En la rakonto pri Varaždin, *New York Times* interalie akcentis ĝian perfektan ŝtone pavimitan historian urbocentron, barokajn preĝejojn kaj palacojn, muzikfestivalojn, aparte la *Barokajn vesperojn de Varaždin*, kaj pri tiu kroata urbo ĝi skribis, ke ĝi estas plej bone konservita parto de la lando.

La urbo Varaždin troviĝas en nordokcidenta Kroatio, sur la dekstra bordo de la rivero *Drava*. Ĝi havas ĉirkaŭ 50.000 loĝantojn kaj estas sidejo de la Departemento de Varaždin. De la ĉefurbo Zagrebo ĝis Varaždin oni bezonas unu horon da veturado laŭ la moderna autoŝoseo. Ĝi estas urbo de metiistoj, entreprenistoj kaj industrio, konata

pro la eksterorindara monumenta, eklezia kaj arta heredaĵo, kaj kun plej bone protektita kaj plej riĉa baroka urba tutaĵo. Krom la komplekso de la Malnova urbo, sur relative malgranda spaco restis konservitaj palacoj, gravaj publikaj konstruaĵoj, interesaj kaj domoj kaj vilaoj en stilo de baroko, rokoko, klasicismo, secesio, kaj unu el la plej malnovaj eŭropaj urbaj konsilantarejoj. Oni nomas ĝin urbo de kampaniloj, parkoj, palacoj kaj anĝeloj, kiuj el altaroj, muroj kaj pentraĵoj dankas ĉiun rigardon per sia boneco.

En la historiaj fontoj, la plej malnovajn informojn pri Varaždin, menciata sub la nomo *Guarestin*, ni trovas en la dokumento de la reĝo *Bela la Tria* en 1181, per kiu li juĝas en la konflikto inter la zagreba kapitulato kaj la varaždina departementestro *Belee*, pri la bieno *Varaždinske toplice*. La urbo formiĝis kiel kolonio de metiistoj kaj komercistoj apud la mezepoka *castrum*, en la kruciĝejo de malnovaj romiaj vojoj, kvankam la epoko de romia dominado en la urbo mem lasis malmultajn spurojn. Per la buleo de la libera kaj reĝa urbo, kiun al Varaždin en 1209 atribuis la kroata-hungara reĝo *Andreo la Dua*, la loĝantoj de Varaždin ricevis la rajton elekti la urban juĝiston (administranton), kiun oni nomas "richter". La plej gravan politikan evoluon Varaždin travivis per fondo de *Kroata reĝa gubernatora konsilantaro*, enkadre de la Habsburga Monarkio, por kies sidejo la imperiestrino *Maria Theresia* elektis Varaždin, kiu en 1767 fariĝis la ĉefa sidejo de la Banusa Kroatio. Ĝi restis tia ĝis la granda incendio en 1776, dum kiu forbrulis du trionoj de la urbo, post kio la ĉefurbo fariĝis Zagrebo. Cetere, ekde sia fondo Varaždin estis dividita je teritorio de la libera kaj imperiestra urbo Varaždin kaj la teritorio de la fortikaĵo, kiuj kuniĝis en la unuecan teritorion de urbo Varaždin en 1861. Pri la ok jarcentojn longa historio de Varaždin atestas multaj konservitaj dokumentoj, sed ankaŭ multaj valoraj konstruaĵoj, kiel atestantoj de tiu epoko. La plej grava inter ili estas la fortikaĵo de Varaždin, longtempe nomata *Malnova urbo* (Stari grad), kiu nuntempe estas

la Urba muzeo. Ĝi estis konstruita inter la 14-a kaj 19-a jarcentoj, kaj dum la pasinteco ĝi estis posedaĵo de multaj nobelaj familioj, posede kaj jure apartigita de la reĝa kaj libera urbo Varaždin. En ĝi regis la **grafoj de Celje, Ivan Ungnad, Juraj Brandenburg**, kaj la kroata banuso **Tomo Erdödy** kaj liaj heredantoj, surbaze de la ĉarto de la habsburga reĝo **Rudolfo la Dua** el la jaro 1607. La urba simbolo estas ĝia blazono troviĝanta sur la urba konsilantarejo ekde 1464, kiu estas unu el la plej malnovaj en Eŭropo.

La eklezia arkitekturo en Varaždin ekzistis jam ekde la mezepoko, sed nuntempe grandparte ĝi ne estas konservita. Granda ekspansio de la eklezia konstruaro okazis en la periodo de baroko, kiam en la urbon venis diversaj ekleziaj ordenoj. Unue estis konstruitaj la **Jeziita preĝejo** en 1646, kiu nuntempe estas la urba katedralo, kaj la **Franciskana preĝejo de sankta Johano la Baptisto** (1650), antaŭ kiu troviĝas la monumento al episkopo **Grgur Ninski**, kiun skulptis la kroata skulptisto **Ivan Meštrović**. La **Paroka preĝejo de sankta Nikolao**, la urba patrono, konstruita en 1761, havas la gotikan kampanilon, en kies niĉo troviĝas la skulpturo de sankta Floriano, tiom ofte trovebla en Varaždin, al kiu la loĝantoj ankoraŭ en 1669 starigis la votan preĝejon, petante lian protekton kontraŭ incendioj. En la unua duono de la 18-a jarcento estis konstruita la **Ursulanina monaĥinejo, Preĝejo de la naskiĝo de Jezuo, kaj la Kapucena monaĥejo kaj Preĝejo de Sankta Triunuo** en la okcidenta antaŭurbo.

Varaždin estas konata pro sia tombejo, funkcia ekde 1773, al kiu la hodiaŭan formon donis la viziulo **Herman Haller**, kiu en 1905 komencis ĝian planadon, plantinte ĉirkaŭ 7000 cipresojn, acerojn, fraksenojn, fagojn, buksojn, magnoliojn kaj betulojn, kreinte eksterordinaran ekzemplon de parka arkitekturo kaj naturmonumenton. Unu el la plej valoraj monumentoj en la varaždina tombejo estas "Anĝelo de morto", la verko de skulptisto **Robert Frangeš Mihanović**, kiu simbole prezentas adiaŭon de la vivantoj al la mortintoj. Inter aliaj,

la vizitantoj devus vidi la sepultejon de **Vatroslav Jagić**, kroata filologo kaj la plej granda monda slavisto de la dua duono de la 19-a jarcento.

Varaždin en la mezepoko fariĝis metiista kaj komercista urbo, kaj en 1046 ricevis la rajton okazigi foirojn. Tra la longa historio evoluis diversaj manufakturoj, inter kiuj komence de la 18-a jarcento la manufakturo de ĉokolado "**Dagnese**", bierproduktejoj kaj produktejoj de silko. Fondiĝis gildoj de buĉistoj, drapistoj, potistoj, seruristoj, fusilistoj, vitristoj kaj butonistoj. Per tio firmiĝis la fundamento por moderna produktado kaj industrio. Por evoluo de Varaždin apartan gravecon havis la finkonstruado de la fervojo, per kiu ĝi estis ligita al Zagrebo en 1886. En 2003 estis finkonstruita moderna aŭtoŝoseo de la hungara landlimo al Zagrebo, Rijeka kaj Split, per kio formiĝis kondiĉoj por plua ekonomia progreso de la urbo.

Nun Varaždin estas ekonomia, kultura kaj eduka centro de la Departemento de Varaždin, kiun pro la oportuna geografia situo oni nomas "nordokcidenta pordo de Kroatio" al la mondo.

La riĉa historia heredaĵo kaj la vigla nuntempo faris la urbon unu el la plej interesaj kroataj urboj, kies tavolo malkovriĝas dum ĉiu nova promeno tra ĝiaj stratoj kaj placoj. Kultur-historia vidindaĵo de tiu urbo estas ankaŭ la **Varaždina urba gvardio**, kiu ekzistas jam du kaj duonan jarcentojn (ekde 1750). Tiu urbon, kiu ankoraŭ vivas sian mezeŭropan ritmon, oni nomas ankaŭ "**Malgranda Vieno**". Ĝi posedas la mezepokan kafejon "**Grafino Maria**", kiu estas neevitebla loko por ĉiu Varaždinano kaj turisto. Laŭ la onidiro, grafino Maria ne estas nur la ĉefrolantino de la samnoma opereto, sed ŝi vere vivis en la urbo komence de la pasinta jarcento. La komponisto **Emmerich Kalman** - kia koincido! - vivis en la supra etaĝo de la nuna kafejo. La konatan arion "**Komm mit nach Varaždin**" (*Venu kun mi al Varaždin*) ni menciuj ĉe la fino de ĉi tiu mallonga historio pri Varaždin, kiu hodiaŭ havas la statuson de la plej dezirinda vojaĝcelo, kaj kiun ĝiaj loĝantoj ĉiam ŝatis kaj la turistoj admiris kaj laŭdis.

Tradukis: J.P.



RENKONTIĜO KUN "PADMA" EN SUBOTICA

Letero al Tibor

Ivan Kujundžić

Kara Samideano, Patrono nia!

Same kiel ni, anoj de societo, kiu portas Vian nomon, omaĝas la datrevenon de Via forpaso, tiel ni ankaŭ festas Vian naskiĝtagon. Ĉi-foje, la 15-an de februaro, ni festis Vian 102-an naskiĝdatrevenon. Ĉe tiu okazo ankoraŭfoje montriĝis, kiajn neforviŝeblajn spurojn Vi lasis ĉie, kie Vi vojaĝis kaj restadis dum Via vivo. Viaj vojaĝoj entenas ne nur la fizikajn dimensiojn. Vi vojaĝis ja ankaŭ trans tempaj kaj spiritaj dimensioj de ĉi tiu planedo.

Ni kolektiĝis en neatendita nombro en la Malferma Universitato de Subotica. Laŭ la programo, nia estimata samideano *Elizabeto Sekelj* unue parolis pri la historio de Via porinfana romano "Padma, la eta dancistino", kiu estas la unuan fojon eldonita Esperantlingve. La

eldono aperis pasintjare en Kroatio, dank' al engaĝiĝo de elstara kroata esperantisto, sinjoro *Josip Pleadin*. La novpresita libro estas al ni prezentita tiel, ke nia samideano *Erzsebet Ilijin* kaj junulino *Blanka Laslo* alterne, Esperantlingve kaj serbe legis kelkajn belajn frazojn el la ĉapitro pri geedziĝfesto... Aldone, por montri al ni la hindan dancon "Baratanatyam", kiun dancis la profesia dancistino en "Padma...", kaj kiun la knabino Padma tiel fervore deziras ellerni, estis al ni prezentita mallonga filmo pri tiu danco. Via priskribo de tiu danco en "Padma..." estas fakte Via vojaĝo laŭ spirita dimensio... Ĉar tiuspeca danco en Hindio ne estas nur simpla danco. Ĝi estas interparolo kaj preĝo al dio(j). Ĉiu movo de dancistino, ĉiu ŝia gesto, rigardo, paŝo, mano- kaj fingromovoj, en ritmo de ĉiela, mistera muziko, entenas profundan, transcendan signifon. Tiuj dancistinoj en Hindio estas dum jarmiloj tre alte honorataj. Ne estas hazarde ke ĝuste Padma, kiu revis esti tia dancistino, trovis la groton, kiu

estas subtera templo el antikva tempo. Al la ĉeestantoj tre plaĉis tiu ĉi prezentado, ĉar inter la du programeroj, kelkaj aĉetis ĉiujn kvar ekzemplerojn de la libro, kiujn oni proponis por vendo.

Kiel lastan punkton de la programo, oni projekciis la filmon "Laŭ la spuroj de Tibor Sekelj", kiu ĝis nun jam kelkfoje estis prezentita en diversaj lokoj, ekzemple dum la Eŭropa film-festivalo en Palić 2013, en *Kinoteka* en Beogrado, en la kinejo "Lifka" en Subotica en septembro 2012 (kio estis ĝia oficiala premiero), dum film-revuo en Zagrebo kaj en Senta. Iuj homoj volonte rigardis ĝin ankoraŭfoje. Tiu 90-minuta filmo, kiun verkis du junaj homoj, *Stipan Milodanović* kaj *Josip File* el Subotica, meritas ĉies atenton... La aŭtoroj, senpretendaj junuloj, per tre limigitaj financrimedoj, sen la necesa scio de lingvoj, kiujn oni parolas en Sud-Ameriko, sen spertoj en tiaspecaj entreprenoj, sed kun granda scivolemo kaj entuziasmo, ekvojaĝis sekvante Viajn spurojn. Ili volis sperti ion el tio, kion Vi spertis kaj tiel bele priskribis en Viaj privojaĝaj verkoj... Ni, la spektantoj, dum la projekciado admiris la belegan, majestan naturon de Sud-Ameriko, la regionojn de Andoj ĝis la riveroj de Matogroso norde, kaj ĝis la Magelana markolo sude...

Sed la plej plaĉaj estas multaj filmpartoj, kie la aŭtoroj majstre montras la renkontiĝojn kun diversaj homoj, loĝantoj de Argentino, Brazilo, indiĝenoj, kaj elmigrintoj el niaj regionoj... Kompreneble, ili ĉiam serĉas kaj trovas Viajn spurojn laŭ la tuta kontinento. Multaj homoj konas Vian nomon, legis Viajn librojn... La du aŭtoroj dum tiu vojaĝo komencis paroli hispanlingve, kaj



per mirinda facileco kontaktiĝis kun ĉiuj homoj... La etoso ĉe tiuj renkontiĝoj ĉiam estas gaja, leĝera. Rigardante, multfoje oni povas ridi, rideti, sed troviĝas ankaŭ kelkaj kortuŝaj scenoj, ekzemple la renkontiĝo kun la strata knabo, indiĝeno, ŝuopurigisto ... Aŭ la renkontiĝo kun niaj elmigrintoj, kiuj jam preskaŭ forgesinte la lingvon de la malnova patrujo, kun granda fervoro kaj nostalgio kantas la kantojn de sia naskiĝlando...

Sinjoro **Josip File**, kies hobia estas montgrimpado, provis konkeri Akonkagvon, grimpane laŭ Viaj priskriboj el la libro "Tempesto super Akonkagvo". Bedaŭrinde, jam proksime al la celo, malhelpis lin tre malfavoraj veterkondiĉoj ... Je nia demando li respondis, ke li ne rezignis de tiu entrepreno, sed li provos denove. Ni, la spektantoj, rigardante tiun ĉi filmon, ekkomprenis Viajn vortojn: "... por mi la vojaĝoj mem ne estis la celo, sed nur rimedo por renkontiĝi kaj konatiĝi kun diversaj homoj, akiri novajn amikojn..."

Post la projekciado de la filmo, eksonis forta, sincera aplaŭdo ... Ni gratulis kaj dankis la aŭtorojn ...

Via spirito ankoraŭfoje estis inter ni ...

La naskiĝo de "Padma"

Erzsébet Székely

Tiu ĉi junulara romano de Tibor – same kiel "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangao" – paralele estis verkita en Esperanto kaj en la serbokroata lingvo. Ambaŭ estas originaloj, neniu tradukis ilin. Libroforme unue ĝi estis eldonita serbokroate en Osijek en 1977. Sed en 1986 Tibor reverkis kaj la serban kaj la Esperantan variantojn.

Pri tio li skribas en siaj leteroj. Unue, la 30-an de novembro 1985 tiel: *"Mi havas junularlibron 'Padma, la eta dancistino', kiu povas esti sekvo de 'Kumeŭaŭa' laŭ ĝia sukceso. Tamen mi devas ĝin reverki kun kelkaj gravaj ŝanĝoj. Tion mi intencas fari komence de la venonta jaro, inter aliaj aferoj."* Kaj la 21-an de aprilo 1986 li skribis: *"Nuntempe mi planas reverki en pli bona formo mian junularan libron 'Padma', kiu temas pri knabino el Hindujo, por ke ĝi estu almenaŭ tiel bona kiel 'Kumeŭaŭa'."*

Malgraŭ tio ke jam ekzistis la plibonigita manuskripto, la slovena eldono en 1988 estis tradukita laŭ la malnova serbokroata libro el 1977.

Nun mi ŝatus mallonge skizi kiel naskiĝis la libro "Padma", kiun ni hodiaŭ prezentas kaj kiu estis presita la unuan fojon laŭ la plibonigita manuskripto. En septembro 2012 mi estis invitita al la bieno de s-ino **Spomenka Štimec** en Hraščina, por la renkontiĝo de verkistoj, kaj mi parolis pri "La kariero de la libroj de Tibor ekster la Esperanto-movado". La renkontiĝon ĉeestis ankaŭ la eldonisto s-ro **Josip Pleadin**, kun kiu mi jam antaŭ jardekoj ekkonatiĝis. Tiam li interesiĝis pri la ankoraŭ neeldonitaj libroj de Tibor.

Nia korespondado komenciĝis en decembro 2012, kiam li petis permeson por deklami la poemon de Tibor "La sango min pelas" dum la Zamenhofa tago en Bjelovar. Komence de januaro venis letero de li kun la demando: *"Kiun ĝis nun neeldonitan Esperantlingvan verkon de Tibor vi volus vidi baldaŭ eldonita?"* Same li demandis pri la neeldonitaj manuskriptoj de Tibor. Mia respondo estis: *"Mi havas la jenajn manuskriptojn serbokroate, kiuj ankoraŭ ne estis eldonitaj: 'Od Patagonije do Aljasko', 'U Zemlji kengura', 'Puteljcima svile', 'Putovanje van vremena' kaj en Esperanto-originalo la manuskripton 'Padma, la eta dancistino'."*

La 11-an de januaro alvenis la respondo: *"Principe mi interesiĝas pri du aferoj: 1) Eldoni la Esperantlingvan 'Padma' laŭeble baldaŭ, kaj 2) Entrepreni komunan tradukon de 'De Patagonio ĝis Alasko' al Esperanto, kaj eldoni ĝin kiam ĝi estos fintradukita."*

La manuskripton de "Padma" mi skanis kaj sendis al s-ro Pleadin la 12-an de januaro 2013, kaj jam la sekvontan tagon venis letero de li: *"Hieraŭ dum malfrua nokto, kaj hodiaŭ frumatene mi sukcesis finlegi la senditan manuskripton de 'Padma'. Belega verko! Mi eĉ ne dubis pri ĝia kvalito, ĉar Tibor havis bonegan rakonto-stilon."*



Mi mencias la datojn, por ke vi eksentu la entuziasmon kaj la rapidecon de la laboro. Post kvin tagoj Josip anoncis: *"Mi jam faris grandan parton de la laboro pri 'Padma'. Krom la kompostado de la teksto, ankaŭ esperantisto desegnistoj el Zagrebo pretigas la ilustraĵojn. Laŭ mia plano, la libro estus finpresita kaj preta por publika prezento fine de marto."*

La 28-an de januaro jam alvenis la teksto por unua provlegado, kiun mi finis dum tri tagoj. Post unu semajno estis sendita la foto pri Tibor por la kovrilpaĝo. La 21-an de februaro venis la informo ke "Padma" proksimiĝas al sia definitiva prespartigo.

Ĉio flue iris ĝis la lastaj paŝoj. Jam preskaŭ estis preta la libro, kiam venis la balotoj en Kroatio, kaj Josip akceptis presi reklamilojn kaj pro aliaj gravaj


kialoj "Padma" estis flanken metita.

Post longa paŭzo, la 4-an de julio alvenis letero de Josip, en kio li anoncas, ke *"hodiaŭ 'Padma' estas finpresita. La bindado estos finita meze de la sekvonta semajno, kaj tiam mi povos sendi al vi la unuajn ekzemplerojn."*

La unua prezentado de la libro okazis komence de aŭgusto en

Prvič Luka dum "Adriatika feriado". La sekvonta okazis la 22-an de septembro en Bjelovar. En Zagrebo ĝi okazis la 13-an de decembro, kaj mi kun Ljiljana ankaŭ ĉeestis.

Mi ĝojas, ke nun, dum la solenaĵo okaze de la 102-a naskiĝdatreveno de Tibor, ni povas prezenti lian plej novan libron ankaŭ en Subotica.



Pri la motivoj por pretigo de la filmo "Laŭ la spuroj de Tibor Sekelj"

Josip File

Okupiĝo pri altmontara alpinismo, apud ĉio alia, postulas multe da vojaĝado. Ofte mi bedaŭris, ke miajn vojaĝojn kaj grimpadajn mi ne sukcesis pere de dokumenta filmo transigi al tiuj, kiuj ne estis kun mi. Kaj tiel naskiĝis la ideo, ke la supreniro al la plej alta pinto de Sud-Ameriko iamaniere estu filmita.

Sed malfacile estis trovi kunvojaĝanton, kiu estus samtempe aventurulo kaj filmisto. Feliĉe, aperis mia multjara amiko **Stipan Milodanoviĉ**, kaj la preparoj por la ekspedicio komenciĝis.

Jam en la komenco, okaze de kolektado de bazaj informoj pri Akonkagvo kaj Sud-Ameriko, la nomo de **Tibor Sekelj** ne povis esti flankenmetita. Lia libro "Tempesto super Akonkagvo" ankoraŭ estas

"Biblio" de grimpantoj al la Andoj. Ĉio, kion bezonas montgrimanto, estas skribita en tiu libro! Fascinitaj per tiu ĉi ekscio, ni daŭrigis lerni pri Sud-Ameriko el liaj libroj kaj vojaĝpriskriboj. De tago al tago en niaj kapoj la vojaĝplano pligrandiĝis, kaj ni kvazaŭ sentis, ke la "onklo" Tibor parolas al ni: "Se vi jam venis ĉi-tien, vi devas viziti ankaŭ tion, kaj tion, kaj tion..."

La supreniro al Akonkagvo fariĝis nur unu el la celoj. Dume aperis la vera celo: vojaĝi laŭ la spuroj de **Tibor Sekelj**. La aventuro povis komenciĝi en Patagonio kaj ĉe la Magelana markolo kaj konduki nin ĝis la praarbaroj de Amazonio, aŭ de Atlantiko ĝis Pacifiko trans la Andoj kaj Akonkagvo. Ni pasis tra kvin landoj kaj travojaĝis 24.000 kilometrojn. Ni gastis



ĉe la Indianoj Karaĵoj kaj ĉe la Argentina Esperanto-Ligo. Ni serĉis malnovajn civilizojn, vizitis Nazkon, Maĉupikĉon, Kuskon kaj Titikakon.

Hejmen ni revenis kun kvindek horoj de filmita materialo kaj tri mil fotoj. Kompreneble, ni produktis filmon, kiun ni donacas al la ŝatantoj de Tibor Sekelj kaj liaj vojaĝoj!

Esperantigis: Lajĉo Imrić



KROATIA-RUSIA ESPERANTO-SEKCIO

✍ Mato Ŝpekuljak



Vendrede, la 11-an de aprilo 2014, en *Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo (Amruševa 13, Zagrebo, Kroatio)* sukcese komenciĝis senpaga interna

kurso de la lingvo Esperanto en kiu pertoprenas 9 societanoj de diversaj aĝo, sekso kaj profesio. La kurson organizas Esperanto-sekcio de la Societo pri la rusa lingvo

kaj kulturo, kaj ĝin gvidas *Mato Ŝpekuljak*, prezidanto de la Societo kaj mem esperantisto. Specifeco de ĉi tiu kurso estas, ke ĝi okazas en la rusa, ĉar ĉiuj partoprenantoj, estante membroj de la Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo, lernas aŭ jam pli-malpli regas la rusan lingvon. Tiamaniere la patoprenantoj, lernante la lingvon Esperanto, samtempe ekzerciĝas en la rusa lingvo. Inter la partoprenantoj estas ankaŭ rusino, vivanta en Zagrebo kaj membranta en la Societo.

Esperanto-sekcio de la Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo starigis ankaŭ amikan rilaton kaj partnerecon kun la Junulara Esperanto-klubo "Verdaĵo" en Odeso (Ukrainio). La sekcio esperas realigi kun la odesa Junulara Esperanto-klubo "Verdaĵo" videopontojn pere de Skajpo kaj ankaŭ reciprokajn vizitojn de membroj de niaj du organizaĵoj. Ni tre esperas, ke la aktuala politika situacio en Ukrainio stabiligoŝ kaj normaligoŝ.


Pliaj informoj pri la aktivecoj de la Sekcio legeblas ĉe:
<http://www.ruskijezik.info/esperanto/>

Mallonge

Kroata Esperanto-Junulara Asocio (KEJA) informas, ke la aranĝo MIRO, kiu devis okazi aŭguste 2014 en Križevci, estas nuligita pro organizaj kaŭzoj.

En la Nokto de muzeoj, la 31-an de januaro, en la Muzeo de urbo Koprivnica, estis aranĝita ekspozicio "Ni revenas en la 1930-ajn", kiu prezentis la urban vivon de

tiu epoko. Interalie, per citado de gazetaj artikoloj, en la ekspozicio estis plurfoje menciita ankaŭ Esperanto, kiu tiam tre disvastiĝis inter la loĝantoj de Koprivnica kaj najbaraj vilaĝoj.



Kroata Ministerio pri administrado en aprilo diskonigis la definitivan version de la propono de Leĝo pri asocioj. La nova Leĝo pri asocioj ekvalidos la 1-an de oktobro 2014.

Kiel anoncite, la (elekta) jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo okazos la 10-an de majo. Samtage jarkunvenos ankaŭ Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto. Ambaŭ jarkunvenoj okazos en Zagrebo.

MULTAJ KONKURANTOJ POR GASTIGI UK-ojn Radenko Milošević

Laŭ la statistiko publikigita en la Jarlibro de UEA, Universalaj Kongresoj de Esperanto ŝajne stagnas kaj perdas la kongresanaron. Post la UK en Vilno (2005), kie kolektiĝis 2344 kongresanoj, rimarkeblas preskaŭ senĉesa malkresko: Florenco 2209, Jokohamo 1901, Roterdamo 1845, Bjalistoko 1860, Havano 1002, Kopenhago 1458, Hanojo 866 kaj Rejkjaviko 1034 kongresanoj. La aktuala aliĝ-listo por Bonaero ne kuraĝigas: fine de aprilo aliĝis malpli ol 600 personoj.

La statistikon certe iomete plibonigos la 100-a UK okazonta en Lillo (Francio) sekvontjare. Temas pri malofta jubileo, kaj ankaŭ la fakto ke ĝi okazos en la lando de la 1-a UK (1905, do temas pri 110-datreveno de la unua UK), evidente ludos gravan rolon.

Sed por la postaj jaroj, malgraŭ la statistiko, regas treege granda intereso. La kandidatoj laŭdire estas San-Francisko (Usono), Lisbono (Portugalia), Seulo (Koreio) kaj Zagrebo (Kroatio). Surprizis la lastatempa apero de ankoraŭ unu kandidato - Nitra (Slovakio), kaj des pli surprizas, ke la koncernaj reprezentantoj de UEA, Osmo Buller kaj Clay Magalhães, oficiale vizitis Slovakion de la 23-a ĝis la 25-a de marto. Pli ampleksa raporto pri ilia vizito legeblas ĉe: <http://sezonoj.ru/2014/04/slovakio-2/>

Se antaŭe cirkulis onidiroj, ke por 2016 Lisbono estas la plej evidenta gastiganto, ĉar en Portugalia UK neniam antaŭe okazis, nun ŝajnas pli evidente, ke elektigos Nitra. Ankaŭ en Slovakio tiu aranĝo antaŭe ne okazis, la slovaka movado havas kapablajn

aktivulojn, kaj la vizito de Buller kaj Magalhães tion aludas. Eble la gastiganto de la 101-a UK jam estos konata antaŭ ol aperos ĉi tiu numero de "Zagreba Esperantisto", sed la oficiala proklamo okazos en Bonaero. Estas tute klare, ke post multaj malgrandaj, UEA bezonas ankaŭ plurajn grandajn kongresojn. Lillo certe estos tia, kaj se estos elektita Nitra, ankaŭ ĝi povus esti amasa vizitota.

Kroatojn jam kelkajn monatoj tiklas la demando, ĉu Kroatio estos elektita kiel gastiganto por unu el la venontaj UK-oj. Malavantaĝe por Kroatio estas, ke UK en Zagrebo okazis en 2001, kio estas nesufiĉe granda tempa distanco por organizi alian UK-on.

UK-oj grave kontribuas al disvastiĝo de la Esperanto-movado en gastigantaj landoj, ĉefe pro pli intensa informado pri Esperanto. Se la aranĝo estas sukcesa, ankaŭ la landa organizanto gajnas sufiĉe grandan monsumon, kio ankaŭ estas utila por evoluigo de aktivecoj en la

gastiganta lando.

La Estraro de UEA certe detale pripensas la aferon ankaŭ pro la neceso stabiligi la financon situacion de la organizaĵo (la defcito por 2013 estos ĉirkaŭ 30.000 eŭroj), kiu ne bezonas kongresajn defcitojn.

Evidentiĝis, ke ekvilibrigi la financojn oni povas unufanke per pligrandigo de enspezoj, kaj aliflanke per reduktado de elspezoj. Redukto de elspezoj estas ĉiam nepopulara, dum sukcesa (alivorte: granda) kongreso povas pligrandigi enspezojn pro la kongreskotizoj, sed ankaŭ pro pli da kongresanoj kiuj pro la kongreso pagas la UEA-membrokotizon. Dum granda kongreso neeviteble kreskas ankaŭ librovendoj, enspezoj pro hotelmendoj, ekskursoj ktp.

Ŝajne ankaŭ estonte la intereso pri gastigo de UK-oj kreskos, kaj multaj senpacience atentos la proklamon de UK-gastigantoj en Bonaero. Inter ili certe ankaŭ Kroatoj!



Nitra - ĉu estonta UK-gastiganto?

JARKUNVENO DE KROATAJ FERVOJISTOJ-ESPERANTISTOJ Zlatko Hinšt

La 11-an de marto, en la ejo de Kroata Societo de Fervojaj Inĝenieroj en Zagrebo, okazis jarkunveno de **Kroata Fervoja Esperanto-Asocio** (KFEA). Ĉeestis dudeko da membroj kaj gastoj. La jarkunvenon malfermis la KFEA-prezidantino **Marica Brletić**, post kio sekvis unuopaj temoj de la tagordo. La Jarraporton (2013) de KFEA kroatlingve prezentis la sekretario **Roža Brletić-Višnjić**, kiu informis, ke dum la laborsezono

2012/2013 la porkomencantan kurson, kiun ŝi gvidis, finis tri personoj. La vicprezidanto de KFEA kaj delegito en **Internacia Fervoja Esperanto-Federacio** (IFEF) **Zlatko Hinšt** sciigis al la ĉeestantoj, ke surbaze de speciala cirkulero kun demandilo de IFEF (pri aktivecoj de landaj asocioj), estas preparita ankaŭ Esperantlingva jarraporto de KFEA. Post aprobo de la laborraporto, sekvis kasista, kontrolkomitata kaj bibliotekista

raportoj. La jarkunveno aprobis ankaŭ la programon de KFEA-aktivecoj kaj financon planon por la jaro 2014. Novaĵo rilate la financadon de la aktivecoj de KFEA estas, ke nova sponsoro de nia asocio estas "HŽ-Infrastruktura", unu el la tri kroatiaj fervojaj kompanioj.

En 2013 la membroj de KFEA organizis 31 regulajn kunvenojn kun dudek prelegoj, interalie kun fervojaj kaj lingvaj temoj. Akcentindas, ke nia gastino estis ankaŭ **Achta Etemadi**, irana ĵurnalistino, kiu pere de Esperanto tradukis la infanverkon de Ivana Brlić-Mažuranić "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić" en la persan lingvo. Ŝi prelegis pri ĉiutaga vivo kaj pozicio de virinoj en Irano. Du membroj partoprenis la 65-an Internacian Fervojistan Kongreson (IFK) inter la 4-a kaj 11-a de majo 2013 en la franca urbo Artigues-près-Bordeaux, kie **Zlatko Hinšt** prelegis enkadre de Fake Aplika Sekcio pri prezoj en la pasaĝera transporto de Kroatio. Dum la vojaĝo al la IFK, **Marica Brletić** prezentis informmaterialojn pri Zagrebo kaj Kroatio en la Esperanto-Societo de Limoges. Membroj de KFEA dum 2013 partoprenis ankaŭ la renkontiĝon "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", okaze de la Tago de urbo Bjelovar, la tradician verkistan kaj tradukistan renkontiĝon en la bieno de Spomenka Štimec en Hrašćina-Trgovišće, la 3-an Montkabanan Renkontiĝon (MKR) sur Papuk kaj la internacian seminarion "Apliko de Esperanto en Profesia Agado" (AEP) en la bulgara urbo Karlovo, kun faka prelego.

RESANIĜO DE DU KROATAJ ESPERANTISTOJ

En *Speciala hospitalo por medicina rekapabligo en Varaždinske toplice*, post operacioj resaniĝas du aktivaj kroatiaj esperantistoj: **Stjepan Žarina** el *Velika Gorica* kaj **Srećko Radulović** el *Sisak*, ambaŭ membroj de *Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj* (UZE).

Stjepan havis operacion de la dekstra kokso, kiun oni plenumis en la zagreba hospitalo *Merkur*, kaj al Srećko estis operaciita la spino, en la *Centro por spinkuracado* ĉe la *Traŭmatologia hospitalo* de Zagrebo.

La rekapabligo de ambaŭ Esperantaj aktivuloj bone progresas. Nome de UZE, dufoje vizitis ilin **Katarina Conar Brod**, UZE-anino el Varaždin.

La redakcio deziras al ambaŭ samideanoj baldaŭan plenan resaniĝon kaj reaktivigon.



Sur la foto videblas Stjepan Žarina, kiu staras, kaj en la rulseĝo sidas Srećko Radulović.

LA PLEJ MALNOVA EŬROPA KALENDARO

Zlatko Virc

La urbo *Vinkovci* en Slavonio (orienta parto de Kroatio) apartenas al la plej malnovaj urboj en la mondo, loĝataj kontinue dum pli ol 8.500 jaroj, sed tiu fakto estas tre malmulte konata. Laŭ longeco de senĉesa loĝateco, Vinkovci staras tuj post *Jeriĥo*, kiu estas la unua en la mondo. Tiu fakto estas komprenebla nur se la nekontesteblan arkeologian informon ni kunligas kun la geografiaj kaj klimataj kondiĉoj, kiaj ekzistis en antikva tempo, kaj kun la tiama evolunivelo de la homa civilizo.

Vinkovci situas en la suda parto de *Panonia ebenaĵo*, kie *Danubo* kaj *Savo*, la du grandaj riveroj, fluas je nur 30-kilometra interdistanco. *Danubo* por la prahistoria homo estis granda obstaklo, same kiel *Savo*, fluanta iom pli sude. Pro tio la migradoj de oriento al okcidento okazadis ĉefe inter tiuj du riveroj. La du riveroj, kun multege da fiŝoj, kaj la apuda fekunda grundo kaj bestoplenaj arbaroj, estis idealaj por loĝado de homoj. Tial ne mirigas, ke la vivo en ĉi tiu regiono komencis intense evolui ankoraŭ dum la frua ŝtonepoko. Kiel la riveroj kaj la fekunda grundo estis antaŭkondiĉoj por evoluo de la homa civilizo en Mezopotamio kaj Egiptujo, ankaŭ

Printempo

Somero

Aŭtunu

Vintro




ĉi tie la favoraj vivkondiĉoj influis la civilizan evoluon.

En la tempo de la *Vučedola kulturo*, kies komenco okazis ĉirkaŭ 3.000 a.K., la migradaj ondoj de hindeŭropaj popoloj atingis ĉi tiun regionon, kaj per ili komenciĝis pli intensa ekonomia, kultura kaj socia evoluo. Komparante la evolustadion, la atingojn de la *Vučedola kulturo* ni povas meti en la saman rangon kun la atingoj de la sumera civilizo en Mezopotamio, de la malnova regno en Egiptujo (en la tempo de piramidoj) aŭ de Trojo.

La najbaraj bosniaj montaroj, kie ekde la plej frua epoko oni fosis la kupran ercon, de kie la erco per komercado atingis ankaŭ tiun ĉi regionon, ebligis muldadan de kupraj armiloj kaj laboriloj, kiuj garantiis al la vuĉedola loĝantaro

trankvilan vivon, kaj ekonomian, socian kaj spiritan evoluon. En tia ekonomia prosperado, logike evoluis ankaŭ la scioj bezonataj por la evoluo de la homa civilizo. Kiel en Egiptujo kaj Sumerujo estis bezonata kalendaro por observado de la naturaj fenomenoj, ekzemple inundoj, same tiel en la *Panonia ebenaĵo* estis bezonata kalendaro por ĝustatempe antaŭvidi la samajn fenomenojn. Pro tiuj bezonoj, surbaze de observado de la universo, ekestis *Oriono* - la plej malnova hindeŭropa kalendaro, el kiu forestas la luna simbolismo, kiu estas hindeŭropa trajto.

Vinkovci kuŝas sur la 45-a norda paralelo (de la tera latitudo), pro kio la klimataj karakterizoj, nomataj jarsezonoj, estis tre rimarkeblaj, kaj posedis specifajn trajtojn.



Printempo

Somero

Aŭtunu

Vintro



En la epoko kiam la kalendaro ekestis, ekzistis iomete aliaj astronomiaj karekterizaĵoj (ĉio malfruas je 50 tagoj). Printempe en la ĉielo dominis **Oriono** kaj la **Suno**, somere **Plejado**, **Kasiopeo** kaj **Cigno**; aŭtune **Plejado**, **Ĝemeloj** kaj **Fiŝoj/Pegazo**, kaj vintre **Plejado**, **Ĝemeloj**, **Fiŝoj/Pegazo**, kaj la dominanta vintra stelaro **Oriono**. Ĉi tiu ekscio instigis profesoron d-ron sci. **Aleksandron Durman** pli profunde okupiĝi pri la ujo elterigita dum la arkeologiaj esploradoj de la vuĉedol-kultura trovejo en **Vinkovci**. Ĝi estas la ujo 15 centimetrojn alta, kun 16-centimetra diametro. Ĝi havas kvar zonojn, dividitajn en 12 kampojn.

La unua supra simbolvico sur la ujo komenciĝas per printempo. En tiu vico ekzistas nur du simboloj, tiu de la **Suno**, kiu komenciĝas per sia domina pozicio, kaj de **Oriono**, kiu jam komence malaperis el la ĉielo.

La dua vico prezentas someron, kaj komenciĝas per la konstelacioj de **Plejado**, **Cigno** kaj **Kasiopeo**, kaj finiĝas denove per **Plejado**.

La tria vico prezentas aŭtunon. Sinsekve aperas la **Suno**, **Ĝemeloj**, la **Suno**, **Fiŝoj/Pegazo** kaj ĉe la fino la **Suno**.

La kvara vico prezentas vintron. Ĝi komenciĝas per **Kasiopeo**, kiun sekvas **Fiŝoj/Pegazo**, **Oriono**, la **Suno**, **Fiŝoj/Pegazo** kaj **Ĝemeloj**. Por ne fari konfuzon, **Kasiopeo** aperas somere, kaj tiam en la kalendaro estas prezentita per horizontalaj linioj, dum vintre ĝi estas prezentata per vertikalaj linioj.

La feliĉa koincido estas, ke profesoro d-ron sci. **Durman** partoprenis kaj gvidis la elfosadojn en **Vinkovci** kaj en **Vuĉedol**, pro kio li tre bone konas ĉiujn valoraĵojn kaj konojn de la **Vuĉedola kulturo**. Ĉar li vizitis diversajn trovejojn dum malsamaj jarsezonoj, li povis kompari la sinsekvon de aperado de unuopaj konstelacioj en la astronomia ĉielo, kaj kompari ĝin kun la bildoj sur la ujo.

Unue li rimarkis, ke la aperritmo de signoj sur la ujo kaŝas ion simolan. Serĉante ligilojn li konkludis, ke temas pri simboloj prezentantaj unuopajn

konstelaciojn. La vojo al la malkovro estis peniga, ĉar oni devis uzi la rezultojn de diversaj sciencaj disciplinoj. Dank' al li ni scias, ke la konfirmo de la pozicio de unuopaj konstelacioj estis farita ĉe sunsubiro, do kiam aperas la unuaj steloj kaj konstelacioj sur la ĉielo.

Laŭ la **Vuĉedola kulturo** la jaro komenciĝis per la printempa ekvinokso, respektive la 21-an de marto, kiam la **Suno** simbole anstataŭas la pozicion de la plej grava vintra konstelacio **Oriono**. Dum tiu nokto **Oriono** aperas por mallonga tempo, kaj ne plu videblas ĝis la 21-a de decembro. Tiu ekscio al Vuĉedolanoj servis por dividi la jaron je kvar jarsezonoj, kiel prezentite sur la ujo.

Dank' al profesoro d-ron sci. **Durman**, ni povas fieri, ke Eŭropo ne postrestas la malnovajn **Egiptujon** kaj **Mezopotamion**. Ĝenerale dirite, la **Vuĉedola kulturo** havas tiom da trajtoj, ke ni povas libere diri, ke Slavonio estas **Mezopotamio** kaj **Egiptujo** de Eŭropo.

Tradukis: J.P.

O-KAZO

✍ Mihaela Cik

Blanka papero kaj mano. Sennombraj eblecoj. La estonteco de la papero estas tute necerta.

La unua kazo: Nigre vestitaj homoj en la oficejo serioze parolas pri grandaj aferoj. Paperoj sur la apuda tablo bone solvas siajn taskojn, kaj digne plenumas siajn funkciojn. Iaj gravaj numeroj, subskriboj kaj stampoj atestas pri tio. Kaj nun tiel bone uzitaj paperoj dormante kuŝas en iu tirkesto. Kion pli oni povas postuli?

La dua kazo: La fingroj palpe serĉis iun, sed trovis nur krajonon. Destino de la papero estas vojaĝo al fantazio. La vojaĝo gvidis de punkto al linio, de linio al formo, de formo al unueco. La movoj de la mano iĝis pri viglaj kaj rapidaj. La blankecon de la papero anstataŭis verdaj kaj brunaj makuloj. Mardon la papero vojaĝos al pentrajgalerio.

La tria kazo: La mano ŝvebas super blanka papero kiel albatroso. Fine ĝi surpaperiĝis kaj prenis plumon. Ĝi komencas skribi. La literoj formas rakonton pri arbo, kiun antaŭ longa tempo iu plantis memore al nova vivo. Partoj de tiu arbo kaj signoj de tiu vivo ankoraŭ ie ekzistas. Kiom longe?

Dependas de la kazo.



LA UNUA IRANA ESPERANTO-KONGRESO ✍️ Hamzeh Shafiee



La Unua Irana Esperanto-Kongreso (IREK-1) okazis dum la irana novjara festo, inter la 24-a kaj 26-a de marto en Tehrano, kun la temo "Esperanto, lingvo de Ideo kaj Idealo". Partoprenis pli ol 100 geesperantistoj el Irano, kaj 12 eksterlandanoj el 5 aliaj landoj.

Dum la unua kongresa tago, s-ro **Lee Jungkee**, estrarano de UEA kaj eksprezidanto de KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado de UEA), legis la mesaĝon de d-ro **Mark Fettes**, la prezidanto de UEA, kaj la estraranoj de Irana Esperanto-Asocio (IREA) raportis pri aktivecoj de la Asocio, kiu de multaj jaroj estas la landa asocio de UEA.

Tiutaga arta programo konsistis el komediaj teatraĵetoj kaj prezento de iranaj tradiciaj kantoj, plenumitaj de **Vahe-grupo**, kies direktorino estas f-ino **Niku Mamduhi**, denaska esperantistino kaj teatra reĝisoro. Samtage okazis la interkona vespero, dum kiu s-ro **Gay Perrin** el Francio montris lumbildojn pri la francaj urboj en kiuj okazis la 1-a UK en 1905 (Bulonjo) kaj okazos la 100-a UK en 2015 (Lillo).

Fine de la unua kongresa tago s-ino **Tahira Masako** el Japanio plenumis viglan aŭkcion de Esperantaĵoj kaj donacis la tutan enspezon al IREA. Krom siajn proprajn, ŝi aŭkciis ankaŭ Esperantaĵojn de s-ro **Paulo Desailly** el Aŭstralio.

La duan tagon komencis s-ro **Lee Jungkee**, prelegante pri la Seula Kultur-Centro, kiun li fondis antaŭ 23 jaroj, kie ĝis nun li okazigis 266 kursojn.

Inĝ. **Ahmadreza Mamduhi**, vicprezidanto de IREA kaj la ĉefdelegito de UEA en Irano, en sia prelego pri "Irano kaj Esperanto" aludis pri la historia soifado de Irano por la komuna lingvo, kaj pri la unua artefarita lingvo en Irano (Persujo), nomata Balaibalan, ekestinta en 1500-aj jaroj. Li akcentis, ke Irano per Esperanto povas doni al la mondo pacamajn kaj toleremajn instruojn de la irana mistikismo, tre bezonatajn por la hodiaŭa materiisma kaj militema mondo, kaj aliflanke akiri alilandajn artaĵojn, novajn sciencojn kaj teknologiojn. Samtempe kun lia prelego, en alia salono de la Hotel Šahr, en kiu okazadis la kongreso, estis prezentitaj perslingvaj prelegoj akceptitaj de la kongreso: "Manieroj por popularigi la disvastigadon de Esperanto en Irano", "Esperanto kaj ĝia estonta perspektivo", kaj "(Softvaro de) Bibliografio de Esperanto en Irano".

La tria prelegis d-rino **Ŝirin Ahmadnia**, irana sociologo kaj Esperanta poetino, pri la diversaspekta stato de virinoj en Irano kaj potencialaj helpoj, kiujn Esperanto povas fari por ilia prospero. Ŝi parolis pri si mem, kiu, estinte nur 16-jara, lernis Esperanton, kaj sep jarojn poste partoprenis la UK-on en Pekino en 1986. Ekde tiam ŝiaj poemoj aperadis en prestiĝaj internaciaj Esperanto-gazetoj kiel "Fonto", "Heroldo de Esperanto" kaj "Monato".

Ankaŭ dum la dua kongresa tago **Vahe-grupo** prezentis komediajn teatraĵetojn kaj tradiciajn kaj popularajn muzikojn kaj kantojn. La fina - kaj surpriza - prezentaĵo de **Vahe-grupo** estis la fama kaj populara kanzono de karmemora irana-armena **Vigen** (1929-2003), nomata **Freneza Kor'** (*Dele Divane*), en Esperanto kaj la persa kantigante ankaŭ la tutan ĉeestantaron.

La kvara preleganto estis d-ro **So Gilsu**, kiu interesoveke

parolis pri la bezonataj ecoj de Internacia Lingvo, i.a. facileco, perfekteco kaj aplikebleco, kiujn malhavas naciaj lingvoj kiel la angla, kaj Esperanto havas ilin tre kontentige.

La kvinan (kaj la lastan) prelegon, titolitan "Esperanto kaj Traduko", prezentis s-ro **Golam-Reza Azar-Huŝang**, irana verkisto kaj tradukisto, kiu ankaŭ enkondukis *Yumeihon* en Iranon. Li aludis pri 4 kondiĉoj de la tradukanto por bona

tradukado de ordinaraĵ tekstoj, kaj 3 pluaj kondiĉoj por la beletraĵ materialoj.

Post la prelegoj okazis viglaj kaj konstruaj diskutoj. La kongreso akceptis rezolucion, kiun laŭtlegis d-ro **Sayadpour** kaj aprobis la kongresanoj per forta aplaŭdo.

D-ro **Keyhan Sayadpour**, la prezidanto de IREA, al ĉiuj eksterlandaj partoprenantoj donacis ekzempleron de "*Versoj de Persoj*" (originalaj poemoj de Irananoj

en Esperanto). Li ankaŭ disdonis honorigajn kongresajn dankleterojn (al 15 personoj) kaj memor-tabulojn (al 17 personoj, i.a. al d-ro **So Gilsu** kaj s-ro **Lee Jungkee**).

Komuna fotado okazis en la hotela salono kaj ekstere.

Dum la tria kongresa tago (26-an de marto) estis organizitaj ekskursoj al du vidindaĵoj de Tehrano: **Golestan Palaco** kaj **Taĝriŝ Bazaro**, en kiuj partoprenis ĉirkaŭ 40 personoj.

MIA UNUA ESPERANTO-RENKONTIĜO

 *Vasil Kadifeli*



La 7-a Mezorianta Kunveno okazis en Tbiliso (Kartvelujo), de la 5-a ĝis la 10-a de aprilo, kun pli ol 50 partoprenantoj el dekkvino da landoj. Aparte notinda estis la ĉeesto de la Kartveloj kaj de iliaj najbaroj armenaj kaj turkaj.

Legu pli sur la paĝo 28 ➔



Mi estas 55-jaraĝa, kaj mi eklernis Esperanton antaŭ du jaroj. Pro tio mi konsideras min ankoraŭ komencanto.

Pasintjare la Mezorienta Kunveno okazis en Armenujo, sed mi ne povis partopreni ĝin. Ĉar mi ĉiam vojaĝas kun mia edzino, kiu ne estas esperantistino, mi pensis, ke ŝi enuos dum esperantista kunveno. Tamen, ĉi-jare ni decidis partopreni la **7-an Mezorientan Kunvenon en Kartvelujo**, kaj ni frue aĉetis la biletojn. Anstataŭ enui, mia edzino uzis la okazon por partopreni la kurson de Esperanto, kiun por kelkaj komencatoj gvidis eksterlanda instruisto.

Ni atingis **Tbilison**, post laciga flugo, la 4-an de aprilo. En la flughaveno de Tbiliso atendis nin niaj karaj geamikoj. Pro multa salutado kaj interparolado, ni iris al nia hotelo tre malfrue, kaj ne povis dormi dum la nokto pro la multaj impresoj.

La unuan tagon ni kolektiĝis en la kunvenejo. La registriĝo, interkonatiĝo, kantado de la Esperanta himno kaj mallongaj bonvenigaj paroladoj faris la etoson tre agrabla. La interkona vespero, okazinta samtempe kun vespermanĝo, estis bonege organizita. Dum la vespermanĝo ĉiu prezentis sin al la aliaj partoprenantoj, kaj poste kelkaj ludis gitaron kaj kantadis.

La duan tagon matene okazis prelegoj pri la armena Esperanto-movado kaj la verkisto **Ŝota Rustaveli**, kaj la ekzercaro pri Tamara, reĝino de Kartvelujo.

La prelego pri **Ŝota Rustaveli** kaj lia epika poemo "**Kavaliro en Tigra Felo**" estis iom longa, sed tre interesa. Tiu poemego, kiu konsistas el 1587 kvar-versoj, estis la ĉefa temo de nia



Vasil Kadifeli kun la edzino en Kartvelujo

kunveno. Antaŭ la kunveno mi legis la poemon kaj vere ŝategis ĝin. Tiuj, kiuj ankaŭ volas tralegi ĝin, bonolu uzi la jenan ligilon: http://uea.org/vikio/index.php/KAVALIRO_EN_TIGRA_FELO

Kaj pri ĝia aŭtoro Ŝota Rustaveli ekzistas pli da informoj ĉe: http://eo.wikipedia.org/wiki/%C5%9Cota_Rustaveli

Post la tagmanĝo ni vizitis la urbon de **Tbiliso**. Unue ni grimpis al **Mtatsminda monto** kaj parko per funikularo. De tie ni superrigardis la urbon kaj fotis, kaj poste ni veturadis per aŭtobuso tra la antikvaj kaj modernaj partoj de la urbo, por atingi la malnovan **Metekhi preĝejon**, kie staras ankaŭ la statuo de reĝo **Vakhtang Gorgasali**, la fondinto de la urbo. De tie per telfero ni supreniris al **Narikala kastelo**. Ĉi tie staras la statuo de **Kartvela Patrino**, kiu rigardas la urbon kun vinberoj en unu mano kaj glavo en la alia. La vinberoj estas signo de la gastamo al amikoj, kaj la glavo averto al malamikoj.

Piedirante ni malsupreniris la meteton kaj vizitis la sulfurajn banejojn. Promenante poste tra la turismaj partoj de la urbo, ni reiris al la urbocentro.

La trian tagon matene okazis la prelego pri "**Esperanto-Libraro**" en Bjalistoko, kaj **Renato Corsetti** prelegis pri Esperanto en la Mezorienta Regiono.

Posttagmeze ni ekskursis al la malnova ĉefurbo de Kartvelujo nomita **Mtskheta**. Unue ni vizitis **Jvari Monaĥejon**, situantan sur monto, precize transe de la loko, kie kuniĝas du riveroj. Poste ni piknikis, kaj promenis en la urbo, notita en la listo de monda heredaĵo de Unesko. Ni vizitis la grandan monaĥejon **Svetitskhoveli** kaj aliajn vidindaĵojn.

La lastan tagon matene ni iris al la ŝtata universitato, kie ni vidis kaj esploris ekzemplerojn de "**Kavaliro en Tigra Felo**" en multaj diversaj lingvoj. Poste ni revenis kaj aŭskultis la tre interesan prelegon de **Aleksandro Melnikov** "Kiel 'artefarita' lingvo 'naturan kvazaŭetnon' kreis". Laŭ mia opinio, tiu prelego meritas esti libroforme eldonita kaj legita de ĉiuj esperantistoj.

Dum la posttagmezo ni vizitis la **Oran Fonduson de Kartvelujo** en la **Nacia Muzeo**.

La lastan tagon dum la adiaŭa vespero ni ĝuis la Esperantan kaj kartvelan artprogramo. Ĝi estis ege interesa kaj amuza vespero.

La 7-a Mezorienta Kunveno estis mia unua Esperantorenkontiĝo. Laŭ mia opinio ĝi estis tre bone organizita. Mi dankas la kartvelajn geamikojn por iliaj klopodoj kaj gastamo.

Post la kunveno ni partoprenis la dutagan ekskurson tra la orienta vinregiono **Kahketi**, sed ĝi meritas alian artikoleon.

HOMOJ KAJ BESTOJ

 Lenke Szasz

Du ĉevaloj vagadis tra la kampoj, rande de urbego iam nomita "malgranda Parizo". La tereno estis aĉetita de novriĉuloj, kaj ili konstruis luksajn vilaojn sur ĝi. Inter la vilao-vicoj la stratoj ne estas ankoraŭ pavimitaj. Dum pluva vetero la elegantaj, multekostaj aŭtomobiloj pene veturis tra koto kaj akvoplenaj kavoj. Kia malagrablaĵo!

Sur la ĉirkaŭa kamparo, ekde la fino de la aŭtuno, libere vagadis du ĉevaloj. Ho, ne! Ili ne apartenis al la riĉaj loĝantoj de tiuj vilaoj. Ĉi-vintre ekaperis, krom la kutimaj senmastraj hundoj, ankaŭ la senmastraj ĉevaloj. Dum la somero estis terura sekeco, kaj la furaĝo fariĝis tre multekosta. La malriĉuloj ne povis plu bredi ĉevalojn kaj forlasis aŭ forpelis ilin.

La mastro de la du ĉevaloj estas malriĉa homo. Li lasis siajn ĉevalojn sur la kamparo, eble ili trovos ion por manĝi. Almenaŭ li ne vidis ilin morti pro malsato apud la kaduka kabaneto, en kiu li vivas kvinope, kun edzino kaj tri infanoj. Kaj la ĉevaloj vagadis tra la kamparo. Ili ne disiĝis, ĉar ili alkutimiĝis esti kune. Kune ili serĉadis velkintajn herbojn, sekigintajn tigojn de maizo kaj kavetojn, en kiuj kolektiĝis pluvakvo. Alia akvo ne estis en la ĉirkaŭaĵo.

Iun vesperon komencis neĝi. Matene blanka neĝtavolo jam kovris la kamparon. Kia ĝojo por la loĝantoj de la vilaoj! Ili povos viziti enlandajn montarajn ferilokojn, anstataŭ vojaĝi eksterlanden por skiado, kiel la pasintan jaron.

La du ĉevaloj eĉ sekan herbon ne plu trovis por manĝi. Kaj terure mankis al ili la akvo. Se aŭtomobilo rompita la maldikan glacian, kiu kovris la kavetojn, ili sorbis avide la akvon. Pro la soifo

ili suferis plej multe. Al malsato ili estis jam delonge alkutimiĝintaj, same kiel la mastro, kiu forlasis ilin.

Kiam la ĉevaloj ekvidis loĝanton de vilao, ili iris pli proksimen. Ja ankaŭ tiu estas homo, kiel la mastro, kiu foj-foje batis ilin pro ĉagreno, sed donis al ili manĝaĵon kaj akvon. Li batis ilin pro afflikto, ĉar ankaŭ li malfacile trovis vivrimedon por sia familio. Kion fari, se oni naskiĝis en cigana familio, kaj heredis nur malriĉecon? Tamen estas vere, ke iuj ciganoj sukcesis riĉiĝi. Tiuj apartenas al potencaj klanoj. Ilin timas ankaŭ la policianoj kaj la juĝistoj. Tiuj klanaj loĝas en troornamitaj, kiĉaj palacoj, devigas infanojn almozpetadi en okcidentaj landoj kaj junulinojn prostituigi. Same kiel en ĉiu nacio, ankaŭ inter la anoj de la cigana gento estas diferenco. Iuj vivas en palacoj, la aliaj en domaĉoj. La mastro de la du ĉevaloj ne apartenas al riĉa klano. La riĉaj klanoj ne helpas la malriĉajn samgentanojn, eĉ male, malestimas ilin. Sed tio ja estas normala konduto de la riĉuloj.

Neĝo faladis dum la tuta tago. La kamparo estas blanka. Vera vintro, taŭga por skiado! La posedantoj de la montaraj hoteloj nun jubilas. Ĉi-jare ili enspezos amasegon da mono de turistaro!

Glacia vento amasigas neĝblovaĵojn. La malsataj ĉevaloj frostotremis eĉ pli ol antaŭe. Unu el ili malsaniĝis, kaj ekhavis febron. Terure mankis al ĝi la akvo. Sed akvo nenie estas. Nur neĝo kaj glacio. Ĉu ankaŭ la homoj en tiuj belaj vilaoj soifas? Ho, ne, ili trovas akvon tage kaj nokte endome, en kranioj.

Iun malvarman matenon la malsana ĉevalo kuŝis senmova antaŭ la pordego de vilao. La alia staris apud ĝi kaj flaradis

ĝian senmovan kapon. Kial ĝi ne ekstaras, kial ĝi ne pluiras? Ankaŭ la staranta ĉevalo estas malsana, sed ĝi ankoraŭ vivas. Ĝi malsatas, soifas kaj suferas pro malvarmo. Ĝi devus ekiri por serĉi ion manĝeblan, sed kiel forlasi sian kunulon?

Senbrue, aŭtomate la pordego malfermiĝas. Eleganta aŭtomobilo volas eliri, sed ĝi devas ekhalti: ĉevaloj baras la elirejon. La mastro de la vilao volas forpeli ilin, sed tiu sur la tero ne ekmoviĝas, kaj ankaŭ la alia ne forkuras. Al diablo! Kiel li atingos ĝustatempe sian oficejon? Gravulo li estas, li estas atendata! Li elprenas poŝtelefonon. Venu fajrobrigado kaj forportu tiuj la bestokadavron! Alvenas fajrobrigado kaj ankaŭ raportistoj de iu komerca televid-kanalo. Kortuŝaj novaĵoj pri senmastraj hundoj kaj, lastatempe, ankaŭ pri senmastraj ĉevaloj estas bonvenaj, kiam oni vespere sekvas novaĵelsendon en varma ĉambro. La mastro de la ĉevaloj ne vidis la elsendon, li ne havas televidilon, ne estas elektro en lia mizera domaĉo.

La raportistoj filmas la mortintan ĉevalon kun la ankoraŭ vivanta kunulo apude, kiu ne volas forlasi ĝin. El la vilao eliras la edzino de la posedanto

- Kion ni povintus fari por ili? Ni ne bredas dombestojn, ne havas ejon por teni ilin. Forportu la kadavron, ja ne eblas cirkuladi pro ĝi! Kaj jes, kompreneble, ankaŭ la alian. Ja ankaŭ tiu povas mortaĉi en ĉiu minuto.

- Verŝajne ĝi soifas, ne nur malsatas. - diras kompatema voĉo. Sed la edzino de la novriĉulo ne aŭdas la rimarkon. Ŝi jam ekiris por reiri en la varmon. Ŝi estas vestita nur en hejma robo, kaj eliris nur por montri al sia edzo solidarecon en tiu malagrabla situacio.

In memoriam

La 12-an de aprilo pasis la 5-a datreveno post la forpaso de mia kara kaj neforgesebla edzo

FRANJO ŜLABEK (2009-2014)

unu el la plej elstaraj kroataj fervojistaj esperantistoj

Li naskiĝis la 7-an de septembro 1940 en Novigrad Podravski. Ekde 1957 li laboris en la Fervojsporta entrepreno en Zagrebo kiel trajntrafikisto. Poste li studis juron kaj magistriĝis en la Jura fakultato de Zagrebo.

Esperanton li ellernis aŭtodidakte en 1953, kaj ekde tiam li estis membro de la Fervojista Esperanto-Societo en Zagrebo, ĝia vicprezidanto de 1981 ĝis 1984, kaj prezidanto de 1984 ĝis 1991. Li ŝatis literaturon, tradukis kaj verkis por kelkaj Esperanto-gazetoj. En la 1980-aj li estis ĉefo de Jura Fakservo ĉe la Kroataj fervojoj, kaj emeritiĝis en 1993. Li forlasis nin en aĝo de 68 jaroj.

Eternan memoron al mia kara Franjo!

Darinka Ŝlabek



DUŜANKA HALUŽAN (1968-2014)

Post longa kaj nekuracebla malsano, la 8-an de januaro 2014 forpasis en Zagrebo la 46-jara ĵurnalistino kaj esperantistino **Duŝanka Halužan**, kiu dum multaj jaroj estis membro de *Kroatia ĵurnalista societo*. Duŝanka naskiĝis en Zagrebo, la 16-an de julio 1967. Ŝi studis filozofion kaj ĝeneralan lingvistikon ĉe la *Filozofia fakultato de Zagrebo*, kaj dum la studado gajnis la Rektoran premion. Esperanton ŝi lernis en 1983, en la zagreba *Studenta Esperanto-Klubo*, ĉe la kursgvidantino *Ankica Jagnjić*. Poste ŝi mem gvidis A- kaj B-gradajn kursojn por SEK-anoj, kaj instruis Esperanton en "Talento-fondaĵo". Ŝi helpis kunkrei la "Zagreban Metodon" de Esperanto-instruado. Post siaj studentaj jaroj ŝi fariĝis membro de Esperanto-societo

"Bude Borĵan", la plej granda kaj la plej longdaŭra esperantista societo en Zagrebo. Ŝi partoprenis la IJK-on en Zagrebo (1987) kaj la UK-on en Tel-Avivo (2000). Dum la UK en Zagrebo (2001), ŝi rolis kiel kongresa helpantino.

Kiel redaktorino kaj ĵurnalistino ŝi komencis labori en la taggazeto "*Večernji list*", en la unua duono de la 1990-aj jaroj. Dum la lastaj 17 jaroj de sia ĵurnalista kariero, ŝi laboris en la redakcioj de la koncerno "*Eurpapres holding*", kaj laste en la redakcio de la semajna revuo "*Arena*" (ekde 1994 ĝis la ĉesigo de aperado).

Fine de la 1980-aj jaroj ŝi membris ankaŭ en la muzika grupo *Ayllu*, kun kiu ŝi prezentadis la bolivian muzikon, ludante la blovinstrumentojn *sikus* (Pajno-



ŝalmo) kaj *kena* (indiana fluto).

La entombigo de nia samideanino okazis la 16-an de januaro je la 15h00 en la tombejo de *Kraljev Vrh* apud *Zapreŝić*.

STATISTIKO PRI ESPERANTA LIBROPRODUKTADO EN 2013



"La Ondo de Esperanto"

La ĉiujara statistiko pri libroeldonado en Esperantujo, kiun publikigas "La Ondo de Esperanto" surbaze de la rubriko "Laste aperis", aperanta en "Revuo Esperanto", konigas al ni, ke dum 2013 aperis 178 libroj en aŭ pri Esperanto, ĉe 92 eldonistoj, kun suma nombro de 25.344 paĝoj. Averaĝe ĉiu libro havas 142 paĝojn, kaj averaĝa prezo estas 9,86 eŭroj. El la aperintaj libroj 23 estis lerniloj, 28 apartenas al originala beletro, 41 al traduka beletro, 18 temas pri planlingvistiko kaj esperantologio, 25 pri historio ktp. Plej multajn eldonis MAS (Francio, 13 librojn), Mondial (Usono, 12 librojn) kaj Iltis (Germanio, 8 librojn), sed laŭ la paĝonombro la tri unuajn lokojn okupis Mondial (Usono, 2.699 paĝoj), MAS (Francio, 2090 paĝoj) kaj Kava-PECH (Ĉeĥio, 1414 paĝoj). La plej aktivaj eldonintoj el 2012, en la jaro 2013 eldonis malmulton: UEA (Nederlando, 3 librojn), FEL (Belgio, 2 librojn) kaj Libro-Mondo (Pollando, nenium libron).

Evidentiĝis el la statistiko, ke Francio dum kelkaj lastaj jaroj ĉiam estas la plej aktiva.

Kompare kun la antaŭaj jaroj, kiam Kroatio ne troviĝis inter la dek plej aktivaj eldonlandoj, en 2013 ĝi okupis la 9-an lokon. En 2013 aperis en Kroatio 7 libroj, sed laŭ la paĝnombro, Kroatio ne aperas inter la unuaj dek landoj.

Laŭ nia scio en Kroatio dum 2013 aperis la jenaj libroj:



"Padma, la eta dancistino" kaj "Cigna kanto" ĉe "Grafokom" en Ĝurđevac, "Bibliografio de artikoloj aperintaj en Zagreba Esperantisto", "La Tilia urbo", kaj "Jarlibro de

UZE" ĉe Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, kaj "Dokumenta Esperanto-Centro 2010-2013" ĉe DEC Ĝurđevac. Efektive ĉiuj libroj estis presitaj en Ĝurđevac!

PUBLIKE PRI ESPERANTO

- La 54-a numero de "**Mali Virovec**" (printempo 2014), gazeto de la lernantoj kaj instruistoj de Elementa lernejo prof. Franjo Viktor Ŝignjar el Virje, sur la paĝo 27 publikigis plenkoloran artikolon (kun du fotoj) "*Esperantist u našoj školi*".

- "**Bjelovarac**" n-ro 8/2014, de la 27-a de februaro publikigis sur la paĝo 31 la artikolon de sia ĵurnalistino Ružica Stojković, titolitan "*Besplatni tečaj od 20 sati*".


- "**Bjelovarski list**" n-ro 284, de la 3-a de marto 2014, publikigis la artikolon titolitan "*Besplatno učenje esperanta*".

- La 12-an de marto 2014 **Radio Terezija** el Bjelovar dufoje disaŭdigis la elsendon "*Gradski eter*", en kiu pri Esperanto parolis Franjo Forjan kaj Josip Pleadin.

*Mi konfesas, ke al Ameriko mi
ĉiŭfoje aliradis kun raviĝo de amanto, kiu ne iras
al rendevuo kun la amatino por science percepti ŝiajn ecojn,
por esplori ŝin per mikroskopo kaj mezuri per milimetro, sed por
halti dummomente antaŭ ŝiaj belaj okuloj, por eksenti molecon
de ŝia haŭto, por admire orekapti ŝian voĉon aŭ en certa
momento kun miro kaŝaŭskulti neritman spiradon aŭ
malkovri verukon sub ŝia akselo.*

Ĵus aperis...

Tibor Sekelj De Patagonio ĝis Alasko



**250 paĝoj
kudra bindo
malmola kovrilo
41 rakontoj
25 tradukantoj**



Prezo:

18,00 eŭroj/150,00 kunaoj

triona rabato ekde 3 ekzempleroj

Mendu ĉe la eldonisto: grafokom@kc.htnet.hr